

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**ILEI: Fortoj
kaj potencialoj**



**Forumo:
Kial la angla
malsukcesos?**



**IJK: Ĉu en
Honkongo en
la jaro 2000?**



Identeco sub lingva minaco

Vi trovos...

185 Malferme

Kion saĝulo ne komprenas...

Renato Corsetti

186 LA LINGVA DIMENSIO

*Cristina L'Homme,
tr. Anna Löwenstein*

*"El la proksimume 6000 lingvoj
nuntempe parolataj en la mondo
deko malaperas ĉiujare."*



188 Instruado

Miloj da nehelpatoj

Maŭro La Torre

190 Afriko

**Brila aŭgusto por
Togolando**

Yao Togbossi



191 Lastatempe

Ĉu Honkongo por 2000?

Laŭ Sjoerd Bosga

TEJO la dolĉa

Laŭ TEJO Tutmonde

Invito al civito

Bruno Masala

192 KALENDARO 1998-99

193 BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1999

194 FORUMO

Kial la angla malsukcesos?

Kim Hionggun, trad. Helga Rapley

**Ĉu oni vere parolas
Esperanton?**

Sylvan Zaft

Ŝajnesperantistoj: kiam la fino?

Sylvia Pöhlmann

196 RECENZOJ

Edmond Brent pri Terminologia gvidilo.

Francisco L. Veuthey pri Katorelo.

*Jorge Camacho pri verkoj de Sten
Johansson.*

*Werner Bormann pri La tria ŝuo de
Ĥrusĉov.*

198 FOLIUME

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ



199 LASTE APERIS

200 REAGOJ

**ABONTARIFOJ 1999 DE
LA LIBROSERVO DE UEA**

Kaj plue...

201 LOKE, FAKE, PERSONE

204 ANONCETOJ

**OFICIALA
INFORMILO**

La kovrilo: "Sido". Foto
partopreninta en la Belartaj
Konkursoj. (Abe Tosimasa)

Malferme: Detalo el la urbo
Hangzhou, Ĉinio. (UEA-arkivo)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informi
ĉu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la
Centra Oficejo. Unuopa ekzemplero
kostas 5,50 gld.

Anoncartarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p.
1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



KION SAĜULO NE KOMPRENAS...

La redaktoro invitis min — kun vortumo espereble ŝerca — verki la ĉi-monatan “predikon”. Nu, mi ne kapablas prediki. Pro tio mi volas komence proponi al vi unu el tiuj ludoj, ĝenerale stultaj, kiujn revuoj proponas kiam estas malpli da novaĵoj por raportoj.

Respondu al jenaj demandoj, elektante unu el tri ebloj:

A. Se post kvindekjara fidela deĵorado forpasas la kasistino de via loka Esperanto-klubo, vi...

1) senprobleme, kvankam senentuziasme, transprenas ŝian lokon;

2) transprenas ŝian lokon kaj komencas administri la klub-adresaron per komputilo;

3) rifuzas transpreni ŝian lokon kaj klarigas al ĉiuj klubanoj ke jam estas tempo malfondi la malnovan klubon en epoko kiam ĉiu per modemo kaj satelita anteno povas libere komuniki kun ĉiuj esperantistoj de la mondo kaj amuziĝi.

B. Se via nacia Esperanto-asocio bezonas estraron pri informado, vi...

1) post iom da petado, cedas kaj akceptas;

2) post iom da petado akceptas kaj tuj pensas traŭki al via nacia lingvo kaj eldoni la plej novan informilon de la francaj esperantistoj;

3) indigne malakceptas, ĉar en ĉi tiu postmoderna epoko oni ne plu bezonas informilojn, sed nur TTT-paĝojn en la literaro Latina-3.

Se vi elektis nur la respondojn 1, vi estas tradicia esperantisto, da kiuj la movada komunumo bezonas amasegon. Se vi elektis nur la respondojn 2, vi estas moderna esperantisto, da kiuj la movada komunumo bezonas amasegon. Se vi elektis nur la respondojn 3, vi estas postmoderna esperantisto, da kiuj la movada komunumo bezonas amasegon.

Vi eble jam komprenis la moralan instruon de ĉi tiu “neprediko”. Universala Esperanto-Asocio, kaj la tuta esperantlingva komunumo, vivas kaj progresas ne danke al mono sed danke al homoj, kiuj libervole decidas dediĉi siajn talentojn kaj tempon al Esperanto. Cetere ankaŭ aliaj neregistaraj organizaĵoj, kiel ekzemple Amnestio Internacia, vivas per tio kaj ne per mono. Tio estas io tre bela en mondo en kiu kelkaj regantaj fortoj klopodas igi homojn nur malaktivaj ĝuantoj de spektakloj.

Se vi opinias ke viaj talentoj ne estas plene ekspluatataj de la movado, informu nin aŭ reagu al la daŭraj alvokoj de viaj lokaj, landaj, fakaj asocioj. Ĉi tie estas loko por ĉiuj, kaj ni, la esperantistaj asocioj, bezonas multe pli da laborantoj ol ni havas.

Estas loko kaj por antaŭmodernuloj kaj por postmodernuloj. La Esperanto-komunumo estas universala ankaŭ pri tio.

Renato Corsetti

Ĉiujmonate estingiĝas unu el la 6000 lingvoj de la mondo, dum aliaj ne ĉesas trudi sin. La danĝero: laŭgrada erozio de kultura plureco kaj lingva diverseco, kaj tial de la ŝanco kompreni la nekonaton.

Kiel ĉiuj vivantaj organismoj, lingvoj sekvas vivociklon. Ili naskiĝas, evoluas aŭ velkas. Ili havas siajn periodojn de disvastiĝo kaj degenero. Ili subigas aliajn aŭ estas subigataj. Eĉ eblas karakterizi ilin kiel kanibalajn, ĉar iuj fortaj lingvoj "manĝas" malpli fortajn. Jen sendube la kialo ke el la proksimume 6000 lingvoj nuntempe parolataj en la mondo deko malaperas ĉiujare. Pro manko de parolantoj, pro milito, pro senpopoliĝo de regiono, aŭ ĉar alia lingvo ekregas: ekzistas ĉiaj kialoj. Sed la sekvoj estas ruinigaj: kiam ajn lingvo senspure malaperas, la mondo perdas parton de sia heredaĵo lingva, kaj tial ankaŭ kultura. Ĉar lingvo estas antaŭ ĉio la perilo de kulturo. "Silentaj kulturoj estas vere maloftaj," komentas Joseph Poth, la direktoro de la lingva sekcio ĉe la Eduka Sektoro de Unesko. "Sen lingvo por subteni kaj evoluigi ĝin, kulturo ne antaŭeniras sed malprogresas. Precize kiel neuzata muskolo en la longa daŭro velkas." Por ke lingvo estu forta kaj kapabla esprimi la tutan gamon de la homa spertaro, ĝi devas esti uzata kaj elprovata je ĉiu nivelo. Fakte, limoj lingvaj pli gravas en la kapo de la homoj ol limoj historiaj. La popolo samea, ekzemple, plutenas sian kulturan kaj lingvan identecon, malgraŭ sia diseco tra Norvegujo, Svedujo kaj Finnlando. Ĝia kunteniĝo estas forĝita per la lingvo. Kulturo kaj lingvo formas nedisigeblan paron. Dum kulturo estas fortika, la lingvo persistas. Kiam estas minacata lingvo, tiam ankaŭ la kulturo.

Privilegioj unu lingvon

Minacoj embuskas ĉe ĉiuj flankoj. Lingvo parolata de malplimulto finfine estas forigata el la oficialaj komunik-

La lingva



Foje sufiĉas la vivdaŭro de tri generacioj por ke iu lingvo kon-

Linguapax: Protekti lingvajn trezorojn

Lingvoj povas kontribui al la internacia paco. Jen la ideo kiu instigis Uneskon en 1986 lanĉi projekton Linguapax ĉe kunveno de lingvistoj kaj instruistoj en Kievo diskutantaj demandojn pri lingvo kaj paco. La celo de la projekto estas protekti ĉiujn vivantajn lingvojn de la mondo, precipe la plej malfortajn: tiujn parolatajn de tre malgrandaj komunumoj aŭ minacatajn de formorto. Kiel komentas Felix Martí, prezidanto de la Internacia Komitato de Linguapax en Barcelono, "ili estas inter la plej valoraj trezoroj de la homaro." Alia celo estas evoluigi novajn lernejarajn programojn por la instruado de fremdaj kaj denaskaj lingvoj, kaj novajn instrumentojn, por kuraĝigi infanojn eklerni lingvojn je tre frua aĝo, ĉar tio kontaktigas ilin kun tio kion Felix Martí difinas la "baza aspekto de la plurismo de homaj socioj." Sume, ĉiuj lernejoj tra la mondo devus ebligi al infanoj lerni almenaŭ tri lingvojn: sian gepatran lingvon, la nacian lingvon, kaj iun internacian lingvon. Ĉi tia lingvopolitiko fortigas kulturajn identecojn, protektas la universalan heredaĵon, kuraĝigas plurlingvan edukadon kaj helpas disvastigi la koncepton de toleremo.

Por evoluigi tiujn programojn kaj por studi difinitajn bazajn lingvo-problemojn, Unesko estas helpata de Linguapax-reto de universitatoj, direktata de la Unesko-Katedro de Lingvistiko ĉe la Universitato de Mons-Hainaut en Belgujo. Kun la projekto intime kunlaboras



la universitata Lingvauni-reto, kun centro en Moskvo, kiu respondecis pri la eldono de la ruslingva "Ruĝa libro de malmulte parolataj lingvoj", de la Rusa Akademio de Naturaj Sciencoj. La libro priskribas

dimensio



plete malaperu, ekz. ĉe meksikaj indiĝenoj.

proksimume tridek lingvojn de la regiono kiujn minacas formorto. Linguapax ankaŭ organizis seminariojn en Latin-Ameriko, Azio kaj Eŭropo, kaj planas alian en Burkina-Faso en decembro pri la lingva heredaĵo, lingvoinstruado (trejnado de instruistoj kaj instrumentadoj), kaj pri la protekto de lingvaj rajtoj. Kunlige kun tio, la filio de Internacia PEN-Klubo en Barcelono — temas pri neregistara organizaĵo kiu kunigas verkistojn el la tuta mondo — petis la subtenon de Linguapax por prepari deklaron pri lingvaj rajtoj, ĉar ne ekzistas vaste aplikebla internacia interkonsento kadre de Unuiĝintaj Nacioj por protekti lingvojn.

En 1996 dum kunveno pri lingvopolitikoj en Bilbao (Hispanujo), Linguapax entreprenis eldoni, ĝis 2001, "Raporton pri la lingvoj de la mondo". La raporto estos destinita por edukistoj, politikistoj, sciencistoj kaj ĉiuj kiuj studas lingvojn. Ĝi priskribos la lingvojn de la mondo kaj iliajn skribsistemojn — se entute ili estas skribataj. Ĝi celas gvidi tiujn homojn, tiel ke iun tagon ili povu diri — laŭ la vortoj de la kataluna poeto Salvador Espriu — "Ni vivis por savi viajn vortojn. Por redoni al vi la nomon de ĉiu kaj ĉia aĵo."

El UNESCO Sources, sep. '98 (trad. Anna Löwenstein)

Foto: Unesko

kanaloj, kaj ĝi riskas entute formorti, se ne plu uzas ĝin tiuj kiuj ankoraŭ ĝin konas. Tia procedo okazas kiam nacio kun ekonomia, politika kaj milita potenco trudas sian lingvon kiel ĝeneralan komunikrimedon. Tiaj "hegemoniaj" lingvoj ofte ekzistis. En la antikva epoko, la alveno de la latina sur la mondan scenejon rezultigis la formorton de la gaŭla. En la mezepoko, la reĝa lingvo *francien* (de la regiono Ile-de-France) disvastiĝis kune kun la reĝa potenco, kaj fine superregis la okcitanan, la frankonan kaj la alemanan, kvankam ĝi komence estis malpli vaste parolata ol tiuj regionaj lingvoj. La franca ofte estis trudata al koloniigitaj popoloj, dum nuntempe la angla de Usono superpezas en internaciaj rilatoj, precipe en scienco. "Tiel privilegii unu lingvon," laŭ la vidpunkto de Poth, "signifas mallarĝigi nian pensadon kaj monorigardon. Kiom ajn bone neanglalingvanoj lernos paroli la anglan, ili neniam regos ĝin kiel tiuj kiuj alproprigis ĝiajn plej internajn strukturojn ekde la infaneco. Tial ili restos ĉiam duarangaj intelektuloj kompare al denaskaj anglalingvanoj." La danĝero ĉe hegemonia lingvo estas ke "ĝiaj parolantoj havas la impreson ke ili ne bezonas lerni iun ajn lingvon krom la propra, ĉar ĝi taŭgas por ĉio."

Respondo al perforto

Tial estas des pli grave lerni lingvojn. Tio malfermas la menson al novaj manieroj vidi aferojn; laŭ maksimumo de Napoleono "parolanto de du lingvoj valoras du homojn". Paroli alian lingvon konsciigas pri la universalaj valoroj komunaj al la tuta homaro. Tial Unesko starigis la projekton Linguapax, kiu antaŭenigas pacon pere de lingvoinstruado kaj per intimaj kulturaj ligoj. La ideo, kiel klarigas Poth, estas "doni specife lingvan respondon al la problemo de perforto. Dum daŭras interparolo, daŭras interŝanĝo de opinioj." Skismoj kaj perforto okazas nur kiam ne plu eblas diskuti. Tial defendi lingvan diversecon kaj apogi la lingvojn de malplimultaj komunumoj fakte signifas doni novan ŝancon al la paco. "Ne eblas sperti pacon, nek internan, nek rilate al aliaj homoj, se oni ne rajtas esprimi sin laŭ la maniero de sia propra kulturo." Lingva konflikto povas degeneri en konflikton kulturan aŭ eĉ armitan. Ĉi tiu temo estas aktualega: la decido de la alĝeriaj instancoj igi la araban la sola oficiala lingvo provokis viglajn reagojn, precipe en la berbera regiono, kie la propraj kulturo kaj lingvo havas fortan pozicion.

Do, kio estas farebla por haltigi la malaperadon de nemateria heredaĵo, kiu jam travivis tiom da jaroj kaj jarcentoj? Bonŝance la morto de lingvo ne nepre estas porĉiama. La komia, ekzemple, parolata en Uralo, sukcesas reviviĝi dum la lastaj jaroj. En la gazetaro kaj la televido, por ne mencii bibliotekojn, kinon, literaturon kaj lernejojn, ĉie furoras la komia. Sed tio ne okazis facile. "La homoj kredis ke por havi perspektivojn, iri al la universitato, trovi bonan postenon, necesas paroli la rusan," klarigas Svetlana Ĥaŝaturova, direktoro de la Moskva lingvocentro kiu okupiĝas pri la lingva aspekto de la temo. Laŭ la ideo de Lenino la unuiĝo de la sovetaj respublikoj devis baziĝi sur rusigo. Tial la "grandioza rusa lingvo" estis deviga fako en ĉiuj respublikoj.

Revivigi lingvojn

En la komia regiono familioj estis forlasintaj sian lingvon, parte ĉar multaj rusoj ekloĝis tie por labori en la nafto-

Miloj da nehelpatoj

Laŭ sia fonda statuto UEA havas kiel unuan celon "disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto". "Disvastigi la uzadon" de lingvo signifas precipe plimultiigi la nombron da homoj kiuj komprenas kaj parolas ĝin. Novaj Esperanto-parolantoj kreiĝas per memlernado aŭ per instruado.

En interesa kaj pensiga studo ("Instruista trejnado: nia prioritato", *Internacia Pedagogia Revuo* 1992/4) Stefan MacGill kalkulis ke, por konservi la ofte asertatan nombron de unu miliono da E-parolantoj, oni bezonus almenaŭ 10 000 agantajn E-instruistojn, kio estas tre pli multe ol la konataj datumoj montras.

Kion faras UEA sur tiu tereno? Se ni relegas la intenc-deklarojn, ekzemple en la Laborplano de UEA 1997-2000, tie ni trovas ke la paragrafo 1.1 (la orda numero signife montras la unuan rangon en la plano!) titoliĝas: "Lernado/instruado de Esperanto". Sub ĝi listiĝas la jenaj programeroj:

1.1.1. Kolokvo pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (Adelajdo, UK '97).

1.1.2. Trejnado de Esperanto-instruistoj (por minimume 50 partoprenantoj jare).

1.1.3. Seminario "Esperanto en la lernejoj" (por lanĉi Unesko-projekton, Montpeliero, UK '98).

1.1.4. Landnivela eksperimenta instruado de Esperanto (1998-2000, en 5 landoj).

Nun mi ne volas diskuti pri tiuj gravaj eroj, parte jam realigitaj aŭ realigataj. Ni nur rimarku ke, koncerne la realiajn taskojn, en la plano legiĝas:

— kunordigo "de ILEI", "de UEA kune kun ILEI", "de UEA kune kun ILEI kaj landaj asocioj";

— subteno de "Unesko pere de la Linguapax-projekto kaj naciaj Unesko-komisionoj".

Do, Kampanjo 2000 klare elvokas kunlaboradon kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. ILEI, kiu venontjare festos sian 50-jariĝon, laŭ sia ĵus novigita statuto estas "faka organizo pri edukado kaj instruado [...]"; kies unua tasko estas "unuigi geinstruistojn kaj geinstruantojn esperantistajn en la mondo, por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto".

Cetere, laŭ la Interkonsento de 1990.07.20, UEA ĝenerale "komisias al ILEI la plemunon de sia internacia eduka laboro, tio estas ĉiaj agadoj por altigi la lingvan kaj kulturen nivelon de la E-parolantoj (i.a. ekzamenoj), por disvastigi la instruadon de la internacia lingvo ĉiunivele kaj por rilati kun edukaj instancoj tiucele".

Ĝis ĉi tie ni parolis pri normoj, interkonsentoj kaj planoj, laŭ kiuj en la kadro de UEA (do de la tutmonda Esperanto-movado) la instruado de la lingvo estas konsiderata kiel unuaranga problemo, solvota kunlabore kun la instruista organizaĵo ILEI. Sed ambaŭ asocioj estas internaciaj "kupoloj", kiuj ĉefe "enkarniĝas" per landaj asocioj kaj urbaj kluboj. Kio okazas je tiuj niveloj? Mi havas la impreson ke tiurilate la situacio estas tre varia laŭ landoj.

▣ kampoj. La komia iom post iom "rusiĝis" kaj verŝajne jam entute malaperus, se la parlamento ne estus leĝofare kuraĝiginta la disvolvon de lingvoj (estas 150 en Rusujo), tiel donante al la diversaj popoloj la ŝancon reakiri sian kulturen sendependecon. Tio laŭ Joseph Poth pravas ke "ŝtatoj povas fari leĝojn pri lingva politiko kaj certigi la pluuzadon de difinitaj lingvoj en la eduka sistemo, en la aŭdvidaj amaskomunikiloj kaj en la publika vivo", tiel helpante ilin disvolviĝi. Sen jura subteno, "regas la leĝo de la ĝangalo, venkas ĉiam la plej forta".

Revivigi lingvon ofte signifas instigi popolon reakcepti siajn tradiciojn "per kantado, dancado kaj folkloro". En Dagestano, kie la parola ĉeflingvo estas la avara, malgranda parto de la loĝantaro strebas emfazi sian sendependecon per revivigo de sia lingvo, la andia. Sen propra alfabeto, la andia ankoraŭ ne estas instruata en lernejoj, sed ĝi jam posedas parolan literaturon. En periodo kiam multaj lingvoj estas estingiĝantaj — ekzemple la kereka, kiun parolas nuraj 3-4 homoj en la regiono — la andia estas "rekreato lingvo, kiun absolute necesas subteni, laŭ la principoj de Unesko," diras Svetlana Ĥaŝaturova.

Lernejo senkulturiga?

Foje okazas ke lingvo ne plu interesas la junularon, ĉar ĝi ne donas aliron al kariero aŭ laborposteno, kaj tiel ne promesas perspektivojn por la estonteco. Do, ili turnas sin al la lingvo ĝenerale uzata de iu plimulto, eĉ se ne temas pri la propra. Rezulte, kelkajn lingvojn parolas nur gemaljunuloj. Tia kazo estas Ebura Bordo, kie, en la densaj arbaroj de la orienta parto de la lando, antaŭ tridek jaroj ekzistis kelkaj lingvoj kun ne pli ol 100 parolantoj. Ili estis transdonataj buŝe kaj simple formortis kun la gemaljunuloj, lasante eĉ ne spuron. En Eŭropo, la frankona povus suferi la saman sorton, krom en Luksemburgio, kie ĝi estas oficiala lingvo. "En la franca departemento Loreno la homoj uzas ĝin ĉiam malpli, por ne ŝajni eksmodaj," diras Poth, kiu mem devenas de tiu regiono. "Lingvo vere troviĝas en vivdanĝero kiam ĝiaj parolantoj hontas uzi ĝin publike." Simile, gejunuloj en kelkaj afrikaj landoj eventuale ĉesas uzi sian gepatran lingvon, "ĉar ĉiuj fakoj estas instruataj en la angla aŭ la franca, kaj la naciaj lingvoj ne plu havas lokon en la studprogramo, nek ricevas rekonon per diplomo."

Gefiloj komencas pensi ke la lingvo de la gepatroj "apartenas al la pasinteco". Ili malestimas ĝin, kvazaŭ ne kapablan konkurenci kun importitaj lingvoj kaj asocioj ĝin kun "subkulturo". Eĉ pli malbone, ili forturnas sin de tiuj kiuj parolas ĝin — de siaj gepatroj, sia vilaĝo kaj sia origina kulturo — kaj cedas al ensorbiĝo en fremdan kulturon. Tiaj homoj ne instruos al siaj propraj infanoj sian devenlingvon, ĉar, laŭ ilia vidpunkto, ĝi ne "havigas pasporton al moderna vivostilo". Mallonge, se la lerneja sistemo ne sukcesos pligravigi tradiciajn lingvojn, ĝi povos mem iĝi "senkulturigilo". Bonŝance, ĝi povas ankaŭ proponi konkretajn respondojn al tiu maltrankviliga situacio; kaj jen la celo de projekto Linguapax. Faciligante aliron al lingvolernado, ĝi povas subteni kulturojn, kaj antaŭvidi, aŭ eble eĉ malhelpi, multajn estontajn konfliktojn.

Cristina L'Homme

El UNESCO Sources, sep. '98 (trad. Anna Löwenstein)

Integre aŭ ĵaluze

En iuj landoj, la landa sekcio (LS) de ILEI estas integra parto de la landa asocio (LA) de UEA. Tio signifas ke ĉiuj esperantistoj kiuj estas ankaŭ instruistoj (aŭ instruantoj), aŭtomate estas membroj de ILEI; reciproke la tuta agado pri E-instruado, ekzamenado, prizorgado de lernolibroj kaj profesia trejnado estas kunordigata de tiu LS, kiu estas samtempe parto de la LA kaj parto de la internacia ILEI. En tiaj landoj la agado en la instrua kaj lerneja kampo estas aparte solida kaj ampleksa.

En aliaj landoj la LS de ILEI ĵaluze gardas sian etan memstarecon, kvazaŭ hobiistaro kiu aplikas la internacian lingvon al sia edukista kampo. Siaflanke la urbaj asocioj aranĝas la kursojn kaj la ekzamenojn, eventuale sub kunordigo de ia landa E-instituto, kiu donas la diplomojn. Ĉeestas do almenaŭ tri organizoj (LA/UEA, LS/ILEI, nacia E-instituto), kun apenaŭ kunordigo. Multloke ILEI ne vere ekzistas kiel asocio; ĝi havas nur abonantojn de sia organo *IPR* kaj perantojn kiuj kolektas la kotizojn.

disponante pri statistikoj, mi malfajne taksas ke ekzistas multaj miloj da instruistoj kiuj konas la internacian lingvon kaj kies agado ne estas profesie kunordigata kaj konvene helpata.

Alia ekzemplo pri latentia potencialo: Post kelkaj helpopetoj de lernejoj emaj starigi kunlaboradon per Esperanto kun samnivelaj lernejoj alilandaj, dum la pasinta vintro mi ekkolektis adresojn de ĉiaj lernejoj (de infanvartejoj ĝis universitatoj) kie oni instruas E-on aŭ io rilatas al ĝi (prelegoj, eksperimentoj, klubo, aŭ simple e-ista instruisto). Kvankam mi ne povis sisteme esplori, tamen relative rapide kolektiĝis 400 tiaj "E-lernejoj", kaj certe multaj aliaj ankoraŭ ne falis en mian reton... Fakte, la listo troviĝas nun en Interreto (<http://www.uniroma3.it/esp/eler/>).

Pli ol mil lernejoj

Do, ĉi-kampe oni povas supozi ke ekzistas pli ol mil lernejoj (inkluzive universitatojn) kun io rilata al Esperanto, kaj ke almenaŭ 300 el ili eĉ havas E-kurson.

La ĵus menciitaj ekzemploj montras ke la movado en sia malgrando havas ioman instru-trezoron, kiun ĝi ankoraŭ ne sukcesas plej fekunde produktivigi.

Nu, kion mi celas per ĉi tiu artikolo? Mi volas sugesti ke, kaptante la okazon de Kampanjo 2000, en ĉiu lando oni baze rekonsideru la staton de E-o rilate instruadon, lernejojn kaj instruistojn.

Por konkretigi la konsideradon, mi proponas jene listeton da krudaj demandoj:

1. Ĉu en via lando ekzistas ILEI-sekcio? Se ne, kial? Sufiĉas kvin e-istaj instruistoj (aŭ instruantoj) por naski ĝin.

2. Se ekzistas ILEI-sekcio, kian rilaton la landa asocio de UEA havas kun ĝi, kaj kun eventualaj aliaj instruaj aŭ ekzamenaj organizaĵoj?

3. Ĉu la LA okupiĝas pri instruado de Esperanto ekster ILEI (ekzemple pri ekzamenado, lernolibroj, trejnado)?

4. Kiu havas kompletan superrigardon pri E-instruistoj kaj E-lernejoj en via lando?

5. Kian rolon havas Esperanto en viaj universitatoj? Ĉu vi kunlaboras kun esperantistaj universitatanoj?

6. Kiel estas trejnataj la instruantoj de Esperanto ĉe vi?

7. Ĉu vi havas por la interesatoj prospekton pri la disponeblaj lerniloj kaj helpiloj nacilingvaj kaj internaciaj (eventuale kun klarigaj komentoj pri la celoj kaj kvalitoj de la materialoj)?

Kompreneble pluraj el la diritaj demandoj meritis pli atentan analizon ol la ĉi-supra "aĉetolisto": sed kial ni ne malfermas debaton pri la konkretaj problemoj, publike en ĉi tiu gazeto aŭ per persona korespondado?

*Maŭro La Torre, prezidanto de ILEI
Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Terza Università
di Roma, Via del Castro Pretorio 20, IT-00185 Roma
☎ +39/06/495-78-05; ☎ 445-26-42
✉ m.latorre@uniroma3.it*

Informado per propra TTT-paĝo (<http://www.uniroma3.it/LPS/esp/ilei>) nepre helpas la realigon de potencialoj ĉe ILEI.

La tasko kaj la fortoj

Se paroli ĝenerale (kun kelkaj esceptoj), ILEI estas nun tre malforta kompare kun la taskoj kiujn ĝi havas laŭdifine. Tamen ĝi povus realigi sian grandan potencialon, se ĝi kapablus akiri la rolon kaj la forton kiujn ĝi meritas havi. Nur pensu pri la membraro: la ILEI-anaro en 1997 ne superis 800. Aliflanke, se vi foliumas la UEA-Jarlibron por nombri instruistojn kaj agantojn pri instruado kaj konsideras ke tie menciigis nur la UEA-delegitoj, sur tiu bazo vi povas taksu kiom da E-instruistoj membras en UEA kaj iel imagi kiom da aliaj povas ekzisti ekstere, precipe en malriĉaj landoj, kie kotiz-pago estas escepta lukso. Ne


VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 28-an de novembro 1998 (10h00 - 17h00)

- ★ Prezentiĝos la kantgrupo AKORDO
- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
CLAUDE PIRON



AFRIKO

Brila aŭgusto por Togolando

La esperantistaro togolanda konsistas ĉefe el lerneĵanoj kaj kelkaj instruistoj. Tial dum ferioj la Esperanto-agado estas en la lando pli intensa ol en aliaj periodoj de la jaro.

Laŭ la programo de Unuiĝo Togolanda por Esperanto, seminario por kursgvidantoj kaj klubestroj devus okazi kune kun la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, en Lomé, de la 10-a ĝis la 22-a de aŭgusto. Sed pro malordoj kaŭzitaj

de politikistoj, la seminario okazis en du etapoj: la unua parto, de la 12-a ĝis la 17-a de aŭgusto; kaj la dua, la 4-an kaj 5-an de septembro.


Entute 23 partoprenantojn lernigis kvin instruantoj pri kvin lernobjektoj. De la 12-a ĝis la 15-a de aŭgusto GBEGLO Koffi kaj SAGBADJÉLOU Kokou instruis pri gramatiko/vortfarado, kaj ATTIOGBE-AGBEMADON B. Mensah pri la historio de Esperanto. Ĉiuj tri, prizorgantoj de la Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando, devis prepari la kursanojn al ties ekzamenoj B kaj C; notindas ke tiuj ekzamenoj estas la elementa kaj meza de ILEI/UEA.

La 15-an de aŭgusto la seminarianoj havis tre allogan paŭzon en la posttagmezo: 23 kursanoj kaj aliaj e-istoj de la urbo Lomé kuraĝigis en la stadiono Lomé-Dzifa la futbalteamon Esperanto de UTE, kiu gajnis matĉon je 3:1 kontraŭ la teamo FC Real (golis AGBOLO Apéléte Didier, 7-a min.; GBEGLO Koffi, 74-a min.; WOKESSOU Ede, 90-a min.; resp. ano de FC Real, 80-a min.). Fine de la matĉo FC Real-anoj kaj spektantoj informiĝis pri la Esperanto-movado, al kiu la honora prezidanto de FC Real instigis la teamanojn aliĝi.

La 17-an de aŭgusto Paul N'ditsi, estro ĉe Asocio Togolanda por la Bonstato Familia, instruis la seminarianojn kaj E-instruantojn pri naskoregulado. Tiun ĉi temon proponis UTE, por ke ĝiaj sekcioj helpu al siaj anoj kaj samlokanoj eviti problemojn koncerne fruan patr(in)iĝon, malfruan gravediĝon/gravedigon, multinfanceon de gepatroj, tre proksimajn gravediĝojn sinsekvajn ktp. Alia leciono pri seks-malsanoj kaj aidoso ne povis okazi, ĉar la urbon Lomé, unu tagon antaŭe, skuis pafado militeca.

En la dua parto, la 4-an kaj 5-an de septembro, AFANTCHAO-BIAKOU Yao prezentis kurson pri grupogvidado. Poste sekvis la skriba kaj parola partoj de la ekzamenoj. Unuafoje en la historio de la Internaciaj Ekzamenoj en Togolando, kandidatoj ĉe la meza ekzameno sukcesis. Do, entute tri trapasis la mezan kaj ses la elementan ekzamenon.

*Yao Togbossi
Vic-sekretario de UTE*




Komplezo de Ham Bakker

Inter la 40 mil loĝigatoj de la tanzania rifuĝejo Lugufu troviĝas ankaŭ e-istoj. En februaro ili kreis "Mag. Helga-Klubon", kiu celas per E-o kontribui al la solvo de interretaj problemoj. Ahombo Scoty Okoko (dekstre) kaj lia lerninto Lwitela M. Guerchoom (maldekstre) atendas konsilojn kaj korespond-kontaktojn. Adreso: BP 612, Kigoma, Tanzanio.

Ĉu Honkongo por 2000?

La 24-an kaj 25-an de oktobro la Estraro de TEJO kunvenis en Roterdamo por sia aŭtuna kunsido.

Estis la unua kunsido por la nova kasisto, Anna-Lena Eriksson, helpota de financa komisiono, kies reprezentanto Ilja De Coster samtempe venis al la CO. Ĉi tiu komisiono kreas



Anna-Lena Eriksson

redaktoro Sabira Ståhlberg. Kun surprizo ĝi rimarkis en *Heroldo* kaj *Literatura Foiro* ripetajn malpravajn menciojn pri aliĝo de la *Kontakto*-redakcio al la Forumo de la E-Civito (vd. dekstre — *Red.*). Ĝi substrekas ke *Kontakto* havas neniun rilaton kun tiu forumo.

Nur semajnon post la fino de TEJO-seminario pri lingvopolitiko (artikolo aperos en venonta numero — *Red.*), la Estraro pridiskutis ankaŭ ties rezultojn, ĉar sur ties bazo TEJO difinos sian lingvopolitikon. Temoj por venontaj seminarioj kaj IJK-j estos elektitaj en rilato kun tiu politiko.

Laŭ raporto de Sjoerd Bosga, estrarano pri informado

TEJO la dolĉa

Enĉi Barković kaj Jozefo Truong reprezentis TEJO-n en la 3-a Sesio de la Monda Junulara Forumo (Braga, Portugalio, 1-8 aŭg.) inter 500 partoprenantoj el 110 landoj. Kune kun aliaj, TEJO kunordigis laborgrupon pri junularaj organizaĵoj kaj ties integriĝado en la UN-sistemon. En la foruma ekspozicio bone lokita informbudo kaj libere preneblaj dolĉaĵoj certigis efikan reklamadon al E-o kaj TEJO.

Laŭ TEJO Tutmonde

modelan buĝeton por IJK, subtene al la financa administrado de la TEJO-kongresoj. Tio des pli gravas ĉar la Estraro baldaŭ kontraktos kun Hungara E-Junularo por la IJK 1999, kaj por 2000 ĝi ekstraktas kun Honkonga Junulara E-Asocio — ankoraŭ sen definitiva decido, sed dezirante kunlabori por tiu kongreso kun HKJEA. Ĉi ties peton aliĝi kiel landa sekcio la Komitato traktos supozeble en 1999.

Kontenta pri la altnivela *Kontakto*, kiu daŭre pliboniĝis tra ĉi tiu jaro, la Estraro plilongigis la kontrakton kun

Invito al civito

Dudeko da establoj debatis en la Unua Forumo de la Esperanta Civito (8-9 aŭg., La Chaux-de-Fonds), kunvokita de Esperanta PEN-Centro kaj de E-Radikala Asocio (ERA).

Reprezentiĝis redakcioj (*Heroldo*, Radio Radicale...), E-kulturcentroj, por-esperantaj asocioj naciaj (la hungara, kataluna kaj svisa) kaj per-esperantaj internaciaj (LF-Koop, IFEF, OSIEK, IKEL...), Itala Interlingvistika Centro kaj la E-fako de Universitato ELTE (Budapeŝto). UEA komplete sin detenis; SAT sendis kuraĝigan mesaĝon. La ĉeestantoj partoprenis la debatojn tre diverse: unu proponas kaj akcele, alia nur observe kaj demande. Notindas ke tiuj kiuj sin nomas raŭm-istoj (ekz. LF) kunvenis kun tiaj kiajn ili povus nomi finvenkistoj (ERA).

Inaŭgura parolado de Giorgio Silfer lanĉis la debatojn. Analizinte la mondan situacion de Esperanto, aparte post 1989, li pritraktis gravajn organizaĵojn en ties rilatoj kun Esperanto. Koncerne la rilatojn kun UN kaj Unesko, li prognozis ke se UEA “pli kaj pli karakteriziĝos kiel neregistara organizaĵo”, tio pligravigos la “figuron de ĝenerala direktoro”. Li precizigis la signifon de *civito*: “kolektivo memkonscia pri sia identeco, praktikanta komunan vivostilon kaj akceptinta komunan leĝaron”. La prelego aperis en *Heroldo* kaj *Literatura Foiro*.

La atingoj de la Forumo oficiale vortumigis en Pakto por la Esperanta Civito kaj en du aliaj rezolucioj. Longe daŭris juraj diskutoj por scii kiu rajtas aliĝi al la Pakto: ĉu nur establoj aŭ ankaŭ individuoj. La Pakto starigas Kortumon de la Esperanta Civito — kiu celas ne nur juĝi, sed ankaŭ arbitracii kaj interpacigi en konfliktoj — kaj, plej interese, Evolukomisionon. Ĉi ties tasko estos, krom prepari ĉiujare raporton pri la evoluo de Esperantio, proponi ideojn, kunvoki sekvantan Forumon de la Esperanta Civito, aŭspicii konferencojn ktp. Ĝiaj ses membroj kaj 3 vic-membroj estis voĉdone elektitaj. La dua rezolucio kompletigas la unuan rilate la rolon de la Evolukomisiono. La tria rezolucio, iniciatita de ERA kaj pli ĝenerala, enkondukas projekton de “registrado de la esperantistoj”.

Bruno Masala (Francio)

Tranĉu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA! Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 1998 mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!

Kalendaro 1998-99

Jen daŭrigo kaj kompletigo de nia aranĝo-listo aperinta en julio (p. 128). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro", la plej kompleta, aperos en marto.

KONSTANTE

*Kvinpetalo, Rue du Lavoir, FR-86410 Bourses, Francio; ☎/☎+33/5/49-42-80-74

NOVEMBRO

22-23: 15-a Kulturkunveno de E-o, Kameoka, Japanio (EPA, Oomoto, Ten'on-kyo, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621-6886; ☎+81/771/225-561; ☎250-061; ☎100507.1652@compuserve.com)

29: Malferma Tago de la Centra Oficejo (por la adreso vd. kolofonon)

DECEMBRO

04-06: 52-a Kultura Semajnfino, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken; ☎+49/6332/981-190; ☎981-192; ☎sel@ur.pils.de)

05-07: "Literaturo en E-o", seminario de Itala E-Federacio, Napolo, Italio (Nicolino Rossi, via Marzabotto 36, IT-80012 Calvizzano - NA)

10-15: 1859...69...79...89: de Zamenhof al Privat tra Gandhi, Lanti, R. Rolland, Bourses, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Georges Lagrange)

12: 14-a Ĉeĥa-Saksa Tago, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Josef Kříž, Družstevní 411/11, CZ-40007 Ústí nad Labem)

27-30: 6-a Togolanda E-Kongreso, Assahoun, Togolando (UTE; B.P. 12096, Lomé; temo: "Al memstarigo de la togolanda movado")

27-03 jan.: 42-a Internacia Seminario, Kassel, Germanio (Norbert Piechotta, Rondellstr. 3, DE-85540 Haar; ☎/☎+49/89/688-37-79; ☎is.admin@esperanto.de, http://www.esperanto.de/is/1998; temo: "Dependeco")

27-03 jan.: 15-a Internacia Festivalo por junaj familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj, Saarbrücken, Sarlando, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎+49/5624/8007; ☎5624/322, http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm; temo: "Hobioj")

29-02 jan.: Budapeŝta silvestro, Hungario (Hungaria E-Asocio, Pf. 193, HU-1368 Budapest ☎+36/1/268-03-06; ☎268-03-31; ☎esperantohea@mail.c3.hu)

30-02 jan.: Transjara Kurskunveno, Kameoka, Japanio (Oomoto, vd. 22 nov.)


31-01 jan.: Novjara festo, montaro Karpatoj, Ukrainio (J. Zaharija, Ĥmelnickij str. 82/4-8, UA-284006 Ivano-Frankivsk 6)

1999, JANUARO

02-09 kaj 09-15: Intensa lingvokurso, tuttaga, rektameta, 70 horoj, Agárd, Hungario (HEA, vd. 29 dec.)

10-23: 15-a Aŭstralia Somerkursaro de E-o, Melbourne, Aŭstralio (Jennifer Bishop, P.O.Box 2122 T, Melbourne 3001; ☎+61/3/98-18-73-58; ☎99-05-36-68; ☎esperanto@education.monash.edu.au, http://www.education.monash.edu.au/projects/Esperanto)

kultura diverseco
en eŭropo



la paska renkontiĝo por la tuta familio

15-a Printempa Semajno Internacia
3-10 aprilo, St. Andreasberg, Germanio

22-24: 9-a Gastronomi semajnfino de JEFO (dolĉaĵoj), apud Parizo, Francio (P. Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03; ☎Pascal.Lecaille@wanadoo.fr)

22-24: Ni festivalu!, Barlaston, Britio (Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ☎372-393; ☎wedgwood.college@staffordshire.gov.uk)

22-25: Novzelandia E-kongreso, Velingtono, Nov-Zelando (David Ryan, PO Box 3867, Wellington; ☎+64/4/383-80-51; ☎kiwimex@extra.co.nz)

27-03 feb.: 4-a Tutamerika Kongreso de E-o, Bogoto, Kolombio (Ap. Aéreo 54800, Bogotá; ☎take99@colomsat.net.co, http://esperanto-kolombio.org/take4/take4.htm; temo: "E-o kaj la tria jarmilo")

FEBRUARO

14-20: 40-a Internacia Fervojista E-Ski-semajno, Karpacz, Pollando (Janina Wereszka, Klodnicka 43/27, PL-54-217 Wrocław)

27-28: E-staĝo, Nantes, Francio (Hélène Vincent, 3 rue Blaise Cendrars, FR-44100 Nantes; ☎+33/2/40-43-92-42)

MARTO

02-07: Enkonduko al la (Esperanta) ĵurnalismo, Bourses, Francio (Kvinpetalo*, gvidas Gian Carlo Fighiera)

05-09: EoLA-11, internacia festivalo de Esperanta arto, Kievo, Ukrainio (☎eolakiiev@esperanto.nu, http://www.gs707.com/esperanto/eola-11/index.html)

11-13: 3-a Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio (Kuba E-Asocio, Apdo 5120, CU-10500 La Habana; ☎+53/7/404-484; ☎338-729; ☎kubesp@mail.infocom.etcasa.cu)

31-06 apr.: 23-a Internacia Junulara Festivalo, Bellaria (Rimini), Italio (Giuseppe Castelli, via Grandi 16, IT-29100 Piacenza; ☎gcastelli@enjoy.it)

APRILIO

03-05: 54-a Kongreso de SAT-Amikaro, Glay, Francio (Roland Cuenot, 35 rue de Villers, FR-25700 Valentigney; ☎+33/3/81-34-64-46)

02-05: 83-a Brita Kongreso, Newport, Kimrio, Britio (John L. Hubert, Blaencwm, Pencader, Dyfed, SA39 9AL; ☎+44/1559/384-687; ☎johnhubert@csi.com, http://members.tripod.com/~esperantowales)

03-10: 15-a Printempa Semajno Internacia, St. Andreasberg, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ☎2641/978-666; ☎psi@esperanto.de, http://www.esperanto.de/psi)

13-17 kaj 20-24: Didaktiko kaj pedagogio, Bourses, Francio (Kvinpetalo*, gvidas Claude Gacond)

MAJO

08-15: 51-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio, Le Mans, Francio (Jean Ripoché, 6 Rue des Platanes, La Gautrie, FR-72230 Arnage; ☎/☎+33/2/43-21-16-39; ☎Jean.Ripoché@wanadoo.fr)

13-16: Printempa Renkontiĝo, Eijsden/Mesch, Nederlando (Nederlanda E-Junularo, Fabien van Mook, Molenstraat 46c, NL-5701 KG Helmond; ☎/☎+31/492/521-991 ☎nej@dds.nl, http://huizen.dds.nl/~nej/p-r.html; temo: "Eŭregionoj")

28-30: 94-a Skota Kongreso de E-o, Orkney, Britio (Irene Bennett, Rossignol, Glaitness Road, St. Ola, Kirkwall, Orkney, Britio KW15 1TW; ☎+44/1856/875-033)

JUNIO

06-12: 21-a Ĉebalta E-ista Printempo, Mielno, Pollando (Pola E-Asocio, pk. 30, PL-75-016 Koszalin-1; ☎+48/94/340-45-63)

Interreto. Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe la TTT-paĝoj www.hungary.net/esperanto/. Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al ☎w3mail@gmd.de: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Eventoj*.

30-04 jul.: **FREŜO**, Olsztyn, Pollando (Andrzej Gielert, ul. Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn; ☎+48/89/542-88-98; ✉angiel@polbox.com)

JULIO

- 05-10: **35-a Brazila E-Kongreso**, Campo Grande, Brazilo (Societo de Esperanto Mato Grosso do Sul, Rua 15 de Nov., 230/55, C.P. 3530, BR-79002-140 Campo Grande – MS; temo: “E-o: kulturo, ekologio, sporto, turismo”)
- 06-07: **Praktikado de la lingvo**, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*, gvidas Paul Gubbins)
- 17-21: **58-a Hispana Kongreso de E-o**, Castellón, Hispanio (Augusto Casquero, Av. Burjasot 29, A-31; ES-46009 València; +34/96/340-13-69; ✉a-casquero@redestb.es)



55-a Internacia Junulara Kongreso
9-16 aŭgusto, Zánka, Hungario

- 17-23: **Internacia E-Konferenco de OSIEK**, Metz, Francio (Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, FR-78100 Montigny-le-Bretonneux; ✉ericl@iname.com, <http://osiek.org>; temo: “Mono kaj civilizo”)
- 24-31: **72-a Kongreso de SAT**, Karlovy Vary, Ĉeĥio (Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice; ☎+420/2/991-22-01; ✉991-21-26; ✉chrdle@telecom.cz, <http://www.worldnet.net/~sat-esp>)
- 25-31: **65-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj**, Berlino, Germanio (Theodor Speckmann, Trierer Str. 45, DE-50674 Köln)
- 31-07 aŭg.: 84-a Universala Kongreso de Esperanto**, Berlino, Germanio (CO de UEA, adreso en la kolofono, <http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html>; temo: “Tutmondiĝo – ŝancoj por paco”)

AŬGUSTO

- 07-13: **33-a ILEI-Konferenco**, Karlovy Vary, Ĉeĥio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: “Edukado al la paco”)
- 07-14: **14-a Ekumena E-Kongreso** (49-a de KELI kaj 52-a de IKUE), 3-a Junulara Ekumena E-Tendaro, Gliwice, Pollando (Stanisław Mandrak, vd. 13-15 nov.; <http://home.t-online.de/home/st-fidelis>; temo: “La ekumena bilanco de la 20-a jarcento”)
- 09-16: **55-a Internacia Junulara Kongreso**, Zánka, Hungario (LKK, Pf. 87, HU-

1675 Budapest; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉hej@math.bme.hu; <http://www.math.bme.hu/~hej/ijk99>; temo: “Komunikado en la informsoĉio”)

- 22-25: **2-a Azia E-Kongreso**, Hanojo, Vjetnamio (Vjetnama E-Asocio, 105A Quán Thánh Str., Hanoi; ☎+84/4/845-45-47; ✉843-27-56)



2-a Azia E-Kongreso
22-25 aŭgusto, Hanojo, Vjetnamio

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1999

Jam por la 50-a fojo invitas UEA al partopreno en la **Belartaj Konkursoj**. El la iniciato de Reto Rossetti kreskis la plej prestiĝa kaj plej longedaŭra arta konkurso en Esperanto, kies unuaj diplomoj estis transdonitaj en la Pariza UK en 1950. Pri scenejo por la ora jubileo zorgos la 84-a UK en Berlino. Post tio UEA planas eldoni antologion de la plej reprezentaj verkoj el la 50-jara rikolto de la Konkursoj.

La partopreno en la Konkursoj estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK: “Tutmondiĝo – ŝancoj por paco?”. Premio “Luigi Minnaja” kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio “Ahn Song-san” kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. ĉe Eseo). Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 1998. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1999. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1999. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La veraj nomoj kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 420 gld. Dua premio: 294 gld. Tria premio: 168 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita): 294 gld. Infanlibro de la Jaro: 882 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologion de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ retroŝte ĉe ✉uea@inter.nl.net.



Kial la angla malsukcesos?



Kiel ĉiu scias, la uson-angla lingvo daŭre akaparas homojn el la tuta mondo. En ne-anglalingvaj landoj oni avide lernas la anglan, ĉar ĝi pligrandigas la ekonomian bonfarton. Kaj dum kreskadas la ekonomia potenco de Usono, ankaŭ tiu tendenco pliiĝadas.

En mia lando – Suda Koreio – preskaŭ ĉiuj klopodegas studi la anglan, sed ĉ. 99% ne atingas eĉ plej bazan lingvoregon. La uson-angla lingvo ja starigas aparte grandajn obstaklojn.

Unue, kvankam la strukturo de la angla estas iom pli simpla ol tiu de multaj aliaj lingvoj eŭropaj, la fonetiko estas tre komplika. Se temas pri dua lingvo por ĉiuj, simpla fonetiko tre gravas, ĉar se vi ne kaptas la sonojn, vi ne parolos flue; necesas aŭdi kaj kompreni antaŭ ol povi paroli.

Malgraŭ ĉiuj fonetikaj malfacilaĵoj la homoj luktos por lerni la anglan, ĉar per ĝi eblas gajni monon, kaj *nur* se eblas gajni monon. Se la studkostoj estas pli altaj ol la atendita gajno, oni facile cedos pri lernado.

En Koreio, tre unulingva socio, ni ensorbas usonan kulturon ĉiutage kaj ĉiumomente, kaj Koreio estas unu el tiuj socioj kiuj plej forte instruas la anglan kiel fremdan lingvon. En la pasinta jaro, koreaj gepatroj pagis pli ol 2 000 000 000 000 da ŭonoj (du miliardoj da usonaj dolaroj) por ke iliaj infanoj lernu la anglan eksterlande. Mi taksas ke ili krome elspezis pluroble tiom por enlanda instruado.

La rezulto estas preskaŭ nula. Mi kredas ke la koreaj gepatroj volonte pagus duoblon eĉ se iliaj infanoj montrus nenian rezultojn, ĉar pli granda elspezo servas unualoke por kontentigi la gepatrojn mem. Certe ili volonte pagus trioblon por *iu* rezultoj, sed same certe ili ne pagus kvaroblon sen videbla diferenco en la lingvoscio de la infanoj.

Ĉu tiaj kalkuloj ŝajnas al vi strangaj? Nu, malfacilas difini limon super kiu oni atingus rezultojn en la instruado de la angla. Mi vetas ke kvinobla pago jam kreus diferencon. Mi scias tion el propra sperto. Vi miregus legi kiom mi pagis kaj pagas por studi la anglan.

Triono al la angla

Mi lernis la anglan dum 16 jaroj en ordinaraĵoj lecionoj. Dum la lernejaj jaroj la angla estas – kun matematiko kaj la korea – unu el la tri ĉefaj ekzamenaj studobjektoj. Koreaj lernejoj kutimas dediĉi trionon de sia tempo al la angla, trionon al matematika kaj trionon al ĉio cetera. Divenu kiom da tempo mi entute okupiĝis pri la angla: po 5-6 horojn *ĉiutage*!

Tio daŭris ĝis antaŭ ses jaroj. Poste mi frekventis privatajn lernejojn. Eĉ nun mi lernas la parolatan lingvon tri horojn semajne en kurso de mia kompanio, kaj neniam mi ĉesis legi anglajn gramatikon kaj vortarojn. Proksimume sep horojn semajne mi studas la anglan. Posedante magistran diplomon pri informadiko, mi intencas doktoriĝi en Usono. Mi povus akiri tri doktoriĝajn diplomojn en la tempo kiun mi pasigis studente la anglan.

Malgraŭ tiom da investo mi ankoraŭ longe foras de flua parolado. Mi pretas investi pli da tempo kaj mono se necese por studi en Usono – sed ĉu aliaj koreoj same? Certe ne! Do la probable ke Koreio dum mia vivo iĝos angle parolanta estas absolute nula!

La korea socio daŭrigas investi en la lernadon de la angla, sed tiu inves-

tado baldaŭ minacos superi la limojn de praktika ebleco. Ekonomio estas la motivo por lerni, kaj ekonomio estos la motivo por ĉesigi la lernadon.

Krome, ekzistas eĉ pli alta bariero en la mondo: tiu kiun starigas etna identeco. En tio ŝajnas kuŝi ia espero por Esperanto. Kelkaj ĉefaj landoj – Japanio, Germanio, Francio, Ĉinio, eĉ Britio – estas en pozicio de “lingva minoritato”. Ili deziras teni sian politikan potencon. En la nuna inform-socio, potenco dependas grandparte de lingvaj diferencoj. Politikaj grupoj ofte asertas ke perdante sian lingvon oni perdas siajn spiritojn kaj identecon. Tial ili pretas multon pagi por sekure gardi siajn lingvojn, simple ĉar lingvo estas grava fonto de kulturo kaj de politika potenco.

Ke la korea registaro pretas akcepti pli kaj pli da angla-usona kulturo, tio estas ne nur pro enspezaj ebloj, sed ankaŭ ĉar ne eblas imagi ke la koreoj parolos la anglan en antaŭvidebla estonteco. Aliaj landoj, same kiel Koreio, elspezos pli kaj pli por lernado de la angla, kaj tio baldaŭ gvidos ilin trans la limon de kosto/efiko.

Je tiu punkto la politikaj grupoj tuj ekparolos pri lingvoj. Kaj la sola taŭga solvo estas komuna lingvo, politike neŭtrala. Bonvolu noti ke la lingva debato okazos nur se la politikaj grupoj ne deziras la anglan kiel sian komunan lingvon, ĉar la angla estas jam laŭfakte komuna lingvo (eĉ ĉe UN, kie profesias multaj interpretistoj kaj tradukistoj). Tial mi pensas ke neniam la *tuta* mondo parolos angle; politiko kaj ekonomio malhelpos tion. Mi atendas ke grandaj mondpartoj pli kaj pli inklinos al la angla lingvo, sed ne sufiĉe por ke la angla fariĝu tutgloba.

Pli vaste angle-inklina mondo estas fekunda tereno por Esperanto, ĉar en tia mondo unuflanke oni konstatas laŭ propra sperto la malfacilecon de dua lingvo, sed aliflanke en ĝi troviĝas la plej sukcesaj lingvolernantoj. Utilas do dissemi informojn pri Esperanto per la angla lingvo. Angle parolantoj, reklamu kaj informu pli kaj pli pri Esperanto en la angla! Plaĉus al mi tion mem fari, sed mia scio de la angla eĉ nun ne sufiĉas por ĝin bone plenumi.

KIM Hionggun (Koreio)

✉ hionggun@kt.co.kr

(Origine sendita anglalingve al la diskutgrupo “soc.culture.esperanto” la 24-an de marto 1998. Tradukis Helga Rapley.)



Estas tempo rekotizi por 1999!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. *Antaŭdankon!*

Ĉu oni vere parolas Esperanton?



Ann Arbor.

“Certe,” mi diris. “Precize kiel vi kaj mi nun konversacias en la angla.” Responde al liaj demandoj pri tio kion mi faras dum mia sesjara emeriteco mi jam informis lin pri miaj Esperanta agado kiel aŭtoro, delegito, estrarano ktp.

Li malfacile povis akcepti ke mi flue parolas Esperanton. Eble estis iomete kvazaŭ oni dirus al li ke oni flue parolas la latinan aŭ la asirian.

Aferisto eniris la konversacion, surprizita pri tio kion mi asertis.

Mi priskribis por li iujn tuthorajn konversaciojn kun alilingvanoj el Ĉinio, Kebekio kaj Argentino. Post tio mi demandis lin: “Ĉu vi iam ajn studis alian lingvon?”

La aferisto jesis.

“Ĉu vi povas konversacii en tiu lingvo ĝuste kiel ni nun faras?”

“Ĝis certa punkto.”

“En Esperanto mi povas paroli ne nur ĝis certa punkto sed precize kiel

ni nun parolas. Fakte, kutime kiam mi parolas Esperanton mi parolas pli rapide ol ni nun faras.”

Post du tagoj mi vizitis amikon en la urbo Traverse City, kiu situas en la norda parto de mia ŝtato. Same kiel mi li estas mezlerneja profesoro emerita. Li demandis: “Ĉu vi vere povas paroli en Esperanto pri iu ajn temo?”

“Certe,” mi diris.

“Ĉu pri filozofio?”

“Fakte, kiam mi vizitis Montrealon lastan someron, mi diskutis pri filozofio kun emerita universitata profesoro de filozofio, kiu naskiĝis en Hispanio kaj instruis franclingve en Kebekio dum pli ol tridek jaroj. Krom tio, ni parolis multe pri aŭtorado kaj literaturo.” Mia amiko kaj mi ofte parolas pri literaturo.

“Tamen, ĉu Esperanto vere havas sufiĉan vortostokon por paroli pri tiaj temoj?”

“Jes. Same kiel la angla. Nur en iuj tre teknikaj kampoj de iuj sciencoj mankas bezonataj terminoj. Tamen en tiuj kampoj ekzistas internaciaj vortoj, plejparte el la latina aŭ la greka, kaj oni facile povas esperantigi tiujn. Kaj se oni ne scias iun vorton, oni povas facile krei ĝin el vorteroj.” Mi klarigis kiel oni plenlibere kunmetas vorterojn en nia lingvo.

La du konversacioj pensigis min. Por ni esperantistoj estas tre ofta sperto komuniki en nia lingvo same flue kiel en la denaska, parolante pri iu ajn dezirata temo. Sed, almenaŭ en landoj kiel Usono, la plejparto de la homoj — eĉ se tiuj scias kio estas Esperanto — ne povas facile kompreni ke ĝi funkcias perfekte same kiel iu ajn alia lingvo.

Nun, kiel dekdujara esperantisto, mi ne deziras arde konvinki ĉiujn homojn kiujn mi renkontas ke ili devas tuj lerni Esperanton por savi la mondon. Tamen mi certe deziras ke ĉiu homo komprenu ke Esperanto estas internacia lingvo kiun oni povas lerni en monatoj da studado, kaj ke almenaŭ centmiloj da homoj parolas flue per ĝi pri ĉiu kutima temo. Se ĉiuj komprenus tion, tiuj kiuj tre deziras same paroli, studus kaj ellernus Esperanton, kaj la kvanto de Esperanto-parolantoj plibliĝus.

Estus bone se ni pripensus kiel ni povos montri al aliaj kiel la lingvo vere funkcias. Filmoj farataj en Universalaj Kongresoj kaj aliaj E-aranĝoj estas tre helpaj tiurilate.

Anstataŭ labori por konvinki ne-esperantistojn ke nia lingvo estas perfekta lingvo kiun ĉiu devas tuj studi, ni penu konvinki ilin ke la lingvo ekzistas kaj ke multege da homoj, lerninte ĝin en kelkaj monatoj, jam nun parolas per ĝi tre flue kaj plene pri ĉiu kutima temo.

Sylvan Zajt (Usono)

Ŝajnesperantistoj: kiam la fino?

Li venis precipe el Orienta Eŭropo, ili venis grupe, kaj ili kapablis paroli nek Esperanton nek eĉ iun ajn lingvon krom la gepatra: la *ŝajnesperantistoj*. “Veteranoj” eble memoras la Budapeŝtan UK en 1983, kun pli da ŝajnesperantistoj ol da ordinariaj, kiun oni kromnomis “la Pola Kongreso”.

Tio okazadis en la 80-aj jaroj. Post la ŝanĝoj, kiam oni povis el Orienta Eŭropo relative (aŭ eĉ tute) facile vojaĝi al la plej gravaj E-aranĝoj, la problemoj ŝajnis ne plu ekzisti. Sed jen somero 1998, tempo de vojaĝlibereco, kaj... la problemoj revenas kiel bumerango. Jen en la Rijeka IJK partoprenas preskaŭ 60 polaj gejunuloj, kiuj ne parolas Esperante, ŝajne apar-

tenas al iu danc- kaj kantgrupo, kaj dum kantado legas Esperante el paperpeco. Ili eĉ ne sciis kiu firmao aŭ organizo sendis ilin tien, ne sciis kion la homoj faras en IJK kaj eĉ ne sciis... kio estas Esperanto.


Se ili minimume volus scii kio estas Esperanto kaj partoprenus en kursoj aŭ iuj programeroj! Sed neniu aktivigis ilin iel ajn. Nu, ili almenaŭ parolis iom da angla kaj germana, kio signifas ke la orienteŭropa junularo jam vidas la avantaĝojn lerni fremdajn lingvojn... Sed kial do ili ne volis aktivigi?

Tio kompreneble donas malbonajn impresojn pri la orient-eŭropaj esperantistoj kaj kaŭzas ke ankaŭ “veraj” e-istoj estas foje negative traktataj de aliaj partoprenantoj. Okazas multe da

miskomprenoj, kaj nek “novuloj” nek “veteranoj” scias kiel reagi.

Kion fari kontraŭ tio? Limigi la aranĝojn al “konstantaj partoprenantoj” kontraŭus la ideon de nia lingvo, kaj fari tion signifus la finon de nia movado. La sola solvo estus malakcepti en la movado firmaojn kaj organizojn kiuj uzas E-on nur por siaj propraj celoj. Ĉu simple bojkoti ilin? Eble la plej bona solvo. Sed ĉu realisma? Ĉu tio ne suferigos verajn e-istojn el malriĉaj landoj, por kiuj ofte la solan eblon partopreni aranĝon donas vojaĝo kun iu firmao, ĉar tiel oni pli facile ricevas la bezonatajn vizojn? Jen problemoj pli profunda ol ni pensas.

Sylvia Pöhlmann (mem el Pollando, kiu volas ke Esperanto progresu en tiu lando, kaj ke la renkontigojn partoprenu pli da poloj — sed veraj esperantistoj)



Fakuloj ope terminografu!


Terminologia gvidilo (1997). Heidi Suonuuti. El la angla trad. Sabine Fiedler. Red. Wera Blanke. Rotterdam: UEA, 1998. 38+4 p. 21 cm. Ilus. 12,00 gld.

Esperanto estas uzata jam multajn jardekojn eĉ por altaj socilingvikaj funkcioj, notinde por internacia komunikado en scienco kaj tekniko. Laŭ la skemo de Blanke 1989* ĝi do jam de longe preterpasis la stadion de lingvoprojekto aŭ, el alia perspektivo, la stadion de kvazaŭpiĝina preskaŭlingvo. La fakto ke *Plena Ilustrita Vortaro* ja entenas milojn da terminoj el multaj sciencaj kaj teknikaj kampoj tamen estas tromploga: por plena ĉiufaka funkciado, Esperanto tuj bezonus efektive dekmilojn — kaj longadaŭre eĉ centmilojn — da novaj terminoj! Por tia kolosa terminkrea laboro ŝajne mankas ĝis nun en Esperantujo la homaj kaj financaj rimedoj.

Konsole dirite, je la aktuala nivelo de akceptiteco de Esperanto kiel faklingvo, la ĝisnuna terminprovizo de nia lingvo — eĉ se kritikinda laŭkvante kaj laŭkvalite — povas ŝajni adekvata: en kazo de bezono oni simple aldonetas pli-malpli improvizitajn neologismojn, kiuj ofte estas malsistemaj imitaĵoj (pruntoj aŭ paŭsaĵoj) el laŭmoda etnolingvo internacia, kiel la angla aŭ la franca.

Por ekforigi tian malordan improvizadon de terminkreado, Terminologia Esperanto-Centro de UEA ĵus publikigis Esperantan version de *Guide to Terminology* de Heidi Suonuuti, eminenta finnlanda terminologino, prezidinta dufoje la Teknikan Komitaton 37 "Terminologio (Principoj kaj Kunordigo)" de Internacia Normiga Organizo (ISO). (Kiel observanto de UEA mi havis la plezuron renkonti ŝin en kanada kunsido de tiu komitato.) *Terminologia gvidilo*, modestampleksa sed enhavoriĉa, ne nur prezentas — fidine, klare, koncize — terminografiajn laborprincipojn internacie elprovitajn, sed insiste alvokas esperantlingvajn fakulojn ope organiziĝi kiel malgrandaj laborgrupoj (5–6-perso-

naj) por sisteme ellabori en ĉiu kazo limigitan terminaron pri specifa parto



de sia fako: tipe centon da nocioj je unu fojo. Tia laborgrupo uzu, krom la *Gvidilo* kaj eventuale la priterminologiaj ISO-normoj (facile haveblaj en la angla aŭ la franca), ankaŭ la

helpon de profesia terminologo kaj de terminologiaj informcentroj naciaj aŭ internaciaj (antaŭ ĉio de Infoterm). Tiucele la verketo indikas utilajn poŝtajn aŭ Interretajn adresojn: de Infoterm, de ISO kaj de la skandinaviaj terminologiaj institucioj (kies tegmenta organizo, Nordterm, aŭspiciis la anglan eldonon de la *Gvidilo*).

Resume: vojonmontrilo teorie solida, praktike plaĉa kaj facile uzebla, laŭ la Viena (Vustera) skolo de terminologio, por unuopaj kaj prefere multopaj terminkreaĵoj diverskampaj — laborilo ege bezonata en Esperantujo.

Edmond Brent (*Kebekio/Kanado*)

Kiam katido foriras

Katorelo. *La vivo de kato*. Jeannette van Mens. Ilus. Bep Thijssse. El la nederlanda trad. Coosje Dekker-Kiefer. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1998. 81p. 13,80 gld.

Homojn ŝajne eblas klasifiki en hundo-amajn kaj kato-amajn. La virino kiu aperas iun tagon en la domo de katido nomita Katorelo por prizorgi ties domon, apartenas al la unua grupo. Tial Katorelo decidas, indigninta, foriri.

Liaj travivaĵoj kiel senhejma kato konsistigas la kernan parton de la historio kiun J. van Mens verkis sub iniciato de la Nederlanda Asocio por Bestoprotektado, por vekti en la homoj

komprenemon pri bestoj kaj aparte pri katoj. La rakonto malkaŝas interesajn faktojn pri iliaj vivo kaj lingvo (vostomovoj, miaŭoj ktp).

La malmultajn makuletojn (kelkajn elfalojn de literoj) en la teksto de C. Dekker-Kiefer grande kompensas la mienokaptaj desegnoj de B. Thijssse. Krome Katorelo venas al ni en plenkoloraj kovriloj, kun agrabla tipografio kaj "antaŭmiaŭo" de Marjorie Boulton. Restas al mi enigmo la danko al esperantisto Bert de Wit, kies rolo en la eldono ne plene klaras (ĉu tradukista dediĉo?!)

Kiel estrarano de Rondo Kato, la faka asocio de la esperantistaj katemuloj, mi varme bonvenigas tiun ĉi plaĉan libreton!

Francisco L. Veuthey
(*Argentino/Nederlando*)

Tri rekomendoj

Verkoj de Sten Johansson. Ĉiuj: Skövde: Al-fab-et-o. 21cm.
Falĉita kiel fojno. *Krimromano.* 1997. 76p. 12,60 gld.
Interkona mateno. *Kvar teatraĵoj originalaj.* 1996. 52p.
10,50 gld. **Mistero ĉe Nigra Lago.** *Originala romaneto
por infanoj.* Ilus. Beatrix Svenonius. 1997. 80p. 12,60 gld.

La sveda aŭtoro Sten Johansson eldonas mem siajn verkojn sub la marko “Al-fab-et-o”. Antaŭ ol recenzi tri el ili mi menciis ke — kiel la same valor-enhavaj mem-eldonaj libroj de André Cherpillod aŭ Gerrit Berveling — lia romano *Falĉita kiel fojno* (aŭ la drasta *La vojo de serpento sur roko*, de Torgny Lindgren, tradukita kaj eldonita de Johansson) meritas aperi en pli luksa vesto. Vinkita kajero kun kolorkartona kovrilo, kvankam digna kaj certe leginda, tamen apenaŭ monstreblas al neparolantoj de la lingvo aŭ en ekspozicio pri ĝia literaturo, se ne paroli pri la juĝkomisiono de la koncerna Nobel-premio.

Interkona mateno konsistas el kvar teatraĵoj originalaj, du el ili premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Johansson konfesas du motivojn por verki dramojn en Esperanto: ekzerci sian esprimkapablon en tute aparta artbranĉo, kaj esperi iaman prezenton, ekzemple kasedan. La komenca unuaktaĵo, *Interkona mateno*, okazas, en sprita kaj amuza maniero, dum Universala Kongreso (kio, en la opinio de kelkaj, sufiĉus por ŝovi ĝin en la kategorion “Esperanta Kulturo”). Plej sukcesaj kaj interesaj mi trovas la duan kaj trian teatraĵojn, resp. *Nepo benita* (malgraŭ iom tro rapida transiro en la antaŭlasta dialogo) kaj *Savboato* (absurdeta, pli surpriza ol la antaŭa, kun subtile dozita angorigo). Resume, plia paŝo aŭ ŝtupo en la malabunda historio de nia teatro.

Ĉu *Mistero ĉe Nigra Lago* estas, kiel demandas sin kaj onin la dorskovrilo, la unua Esperanta romaneto por kaj pri denaskuloj? Probable jes. La hazarda kuniĝo de ses denaskaj geknaboj (tri geparoj) en sveda urbeto same probablas kiel renkonti Madridan taksistojn kiu parolus volapukon, sed, nu, tiajn riproĉojn oni ne faris al

la fama serio “La kvinopo” de Enid Blyton, multrilate pli fantazia. Kaj gravas ke Johansson prezentas la aventurojn de sia plurgenta kaj plurlingva sesopo verŝajne, versimile. La intrigo, krom teni la atenton de la leganto, evitas la pekon de multaj infanlibroj, nome supozoj infanojn stultaj. En stilo samtempe simpla kaj flua, ĝi ne ignoras aktualaĵojn, ekzemple rasismon kaj ksenofobion. Finas la romaneton glosaro kun vortoj bone konataj (*brovo*), ne tiom kutimaj (*riceli*) kaj bezonataj en ĉiutaga lingvouzo (*terpomfrito*, *haŭtkapulo*).

Se la infanoj Schulze ne estus tiel lacaj kaj varmaj, eble Brian Jespersen neniam estus murdita. Aŭ eble — pensas Renate Schulze, ilia patrino, kvankam ŝi nenion diras —, eble ankaŭ la infanoj estus buĉitaj kiel kunikloj. Jen kiel startas *Falĉita kiel fojno*, krimromano realeca

kiel la vivo mem. Germanaj, svedaj kaj alilandaj roluloj implikiĝas en enketon pri mortigo ĉe la bordo de sveda lago. Kiel dirus

Piron, Johansson verkas en la bona lingvo, kiun li mastras kun la esprimivo, elasto kaj eleganto de — kial ne? — Trevor Steele. La fakto ke temas pri ĝenra verko, ne ambicia laŭ siaj amplekso aŭ profundo, ne lasas tro da spaco por ke lia proza talento manifestiĝu plene. Ĝi tamen sin anoncas freŝe kaj impete. Tian impreson faras lia prezento de socio komplika kaj kompleksa, ofte pretervidata sub la bildkarta aspekto de la kvietaj, idilia Svedio. Ne senmotive, do, oni rajtas nun atendi de Johansson la romanon, kriman aŭ ne, kie disfruktos liaj potencialoj.

Du-vorte: tri rekomendoj.

Jorge Camacho (Bruselo)

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ

Berlino. Mendebla ĉe la Libroservo de UEA:

6 gld. po unu folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



Surprizaj instruoj

La tria ŝuo de Ĥruŝĉov. *Sugestoj por privata kaj komerca intertraktado.* H.-Georg Macioszek. El la germana trad. Peter Weide. Pisa: Edistudio, 1997. 63p. 21cm. 18,00 gld.

Iam, postmilita, Ĥruŝĉov estris Sovetion. Tiu potenculo montris indignon kontraŭ la Okcidenta politiko dum plenkunsido de UN en 1960. Brue li martelis sian pupitron per sia ŝuo. Ĉiuj supozis ke, plena de ĵus eksplodinta ĉagreno, li serĉis bruilon, demetis unu ŝuon kaj ĝin uzis.

La aŭtoro klarigas nun ke dum tiu sceno ambaŭ piedoj de Ĥruŝĉov estis ŝue vestitaj. Li uzis kunportitan trian ŝuon! La tuta teatraĵo estis do zorge preparita — por ŝajnigi ke Sovetio (lando kun atombomboj!) estas gvidata de politikisto danĝera, ĉe kiu emocioj regas super racio.

La libro priskribas saĝajn sintenojn dum intertraktadoj, kaj en ekonomio kaj pri ideoj ekz. en politiko; tiel ĝi taŭgas ankaŭ rilate pledadon por Esperanto. Pro tio la subtitolo tekstas: “Sugestoj por privata kaj komerca intertraktado”. Ĉiu el la 17 ĉapitroj temas pri unu strategio. Ili elkreskas de konkretaj situacioj, ĉiuj vigle priskribitaj, al tute ĝeneralaj konsiloj.

La surpriza konstato post la legado estas kiom diferencas sukcesaj kondutoj en intertraktadoj disde unuavice “normale” homaj sintenoj. Ekzistas arto intertrakti, kaj ĝi estas lernebla. Tiu ĉi libro prezentas por tio taŭgan materialon.

La lingvaĵo estas trafa kaj bona, la aspekto plaĉa. La rakontmaniero agrabligas la legadon. Ankaŭ kiu ne volas ekstrakti laŭ la konsiloj, tiu tamen ĝuas interesokaptan tekston.

Werner Bormann (Germanio)





• Disertaĵo pri dilemo

La itallingva disertaĵo (253p.) “La dilemo de Esperanto — Inter help-lingva funkcio kaj naturiĝo” de Federico Gobbo, verkita sub la gvido de prof. Fabrizio Pennacchietti ĉe la universitato de Torino, aprobiĝis kun maksimuma poentumo kaj mencio pri presindeco. Gobbo komplete ekzamenas la fenomenon Esperanto kaj analizas la fundamentan kontraŭdiron inter la roloj “monda helplingvo” kaj “lingvo de aparta komunumo”. Scipovantoj de la itala povas ricevi ekzempleron kontraŭ la fotokopiaj kostoj (ĉ. 40 gld.) de Itala E-Federacio. (R. Corsetti)

• Nova originala romano

Marco Picasso prezentis sian freŝan romanon *La tunelo* la 31-an de okt. en la Budapeŝta E-Domo. Parole “recenzis” ĝin István Nemere, Stefan MacGill kaj Blazio Vaha. (L. Szilvási)

• Michel Duc Goninaz komunikas

“La 13-an de marto 1993 mi respondis favore al la peto de s-ro Ortwin Deubert, posedanto de Iltis-Eldonejo, ke mi verku artikolon por la planita libro *Menade bal pŭki bal*, kiun li intencis eldoni ‘komence de 1995 okaze de la 50-jariĝo de Reinhard Haupenthal’, kaj iom poste mi sendis la koncernan artikolon kun la titolo ‘PIV en perspektivo’.

La 23-an de sep. 1996 mi sciigis al s-ro Deubert ke mi ne plu deziras ke mia artikolo aperu en la planita volumo.

La 1-an de julio 1998, post ricevo de prospekto, anoncanta la baldaŭan aperon de la koncerna libro kun mencio de mia artikolo, mi memorigis al s-ino Irmi Haupenthal, nova respondeculino de Iltis-Eldonejo (nun sub la nomo Édition Iltis), ke mia artikolo ne devas troviĝi en tiu libro. La 17-an de julio mi ricevis de ŝi la respondon ke la libro jam aperis kaj ke ŝi antaŭe ne sciis pri mia letero al s-ro Deubert.

Ĉiuj devas do scii ke tiu artikolo aperis kontraŭ mia volo. Ĉiu ankaŭ povos prijuĝi la konduton de la koncerna eldonejo.”

NAVIGE

TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la inform-oceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj konsultindaj paĝoj Esperantaj!



BIBLIOTEKOJ, MUZEOJ. *Biblioteko de Massa (Italio):* <http://www.esperanto.stm.it/bne/bemshome.htm/>

TROVANTO, katalogo de Internacia E-Muzeo en Vieno, kun Esperanto kiel serĉlingvo: http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.htm/. (Gravas ke multaj vizitu tiun katalogon, ĉar Aŭstria Nacia Biblioteko faras statistikon pri la uzado de ĝiaj katalogoj.)

Uzbekio, Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro (anglalingva): <http://www.friends-partners.org/~ccsi/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm/>

EDUKADO. *Freinet kaj Esperanto:* <http://www.freinet.org/espericem/>

FILOZOFIO. *Enciklopedio Filozofia:* <http://www.cfh.ufsc.br/~simpozio/>

INFORMADO (angle). *Esperanto: A Language for the Global Village* de Sylvan Zaft (vd. pri li p.195), unuaj ĉapitroj: <http://members.aol.com/sylvanz/gvcont.htm/>

INSTRUADO. *La hejmpaĝo de ILEI:* <http://www.uniroma3.it/LPS/esp/ilei/>, kaj “apude” troviĝas *listo de lernejoj* en kiuj Esperanto estas instruata, laŭ lando kaj laŭ tipo: <http://www.uniroma3.it/LPS/esp/eler/>

Pri la *lernolibro* Tendaraĵ Tagoj: <http://www.hungary.net/Esperanto/tendtag.htm/>

LANDOJ, REGIONOJ. Ĉeĥa E-Asocio: <http://www.kuk.cz/cea/>

Ĉilia Esperanto-Asocio: <http://www.geocities.com/Yosemite/Geyser/6661/>

Meksika E-Federacio (inkluzive la ĉarman satiron *Senrimorsaj rememoroj de Onjo Asunta*): <http://www.el-tecolote.com/esperanto/>

Novzelanda E-Asocio: <http://www.geocities.com/Athens/Aegean/3520/>

Sarlanda E-Ligo: <http://www.esperanto.net/sel/>

LIBROJ, LITERATURO. *La manoj de Goliato*, versoj de ĉeĥa pseŭdonimulo el 1968 (trad. Jana Čichová): <http://www.clavis.cz/starto/goljat.htm/>

Hispanlingva prelego de Miguel Fernández pri *Federico García Lorca*: <http://www.distruto.com/esperanto/lorca.htm/>

Grupo Nifo, eldonanto de sciencfikciaj serioj en Esperanto (i.a. *Sferoj*): <http://www.ciudadfutura.com/esperanto/>

La Knabo Frenzeta, desegno-rakonto pri petolema bubo (vd. jul.-aŭg., p.139): <http://www.geocities.com/EnchantedForest/6464/fren.html/>

Karl May-Societo en Esperanto: <http://karlmay.uni-bielefeld.de/kmg/sprachen/esperanto/index.html/>

Verketoj de Sylvan Zaft: <http://members.aol.com/sylvanz/index.htm/>

SOLIDARECO. *Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato*: http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/solidareco/monda_solidareco.htm/

TURISMO. *Turismi en Francio* kun Asocio por Antaŭenpuŝo de la Solidareco: http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/turismo/france_tur.htm/

33 turismejoj en Anĵuo, viziteblaj per Esperanto: <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/turismo/anjou.htm/>

Laŭ propra aserto, *la unua urbo en Germanio* kun oficiala Esperantlingva hejmpaĝo estas Pirmasens: <http://www.pirmasens.de/>

Laste aperis



Aleksandr Puŝkin. 200 jaroj. *Elektitaj verkoj.* Kompilis Mikaelo Bronŝtejn kaj Vladimir Samodaj. El la rusa trad. div. Moskvo: Impeto, 1998. 240p. ISBN 5 7161 0054 6. 22cm. Reprezenta jubilea antologio de la prozo kaj poezio de Puŝkin (1799-1837). 24,90 gld.

Ĉokolado — Kio estas tio? Une Hukstra (1923). Paris: Junulara E-ista Franca Organizo, 1998. 15p. 15x21cm. Krampita. Pri la farmaniero de universala frandaĵo. 3,90 gld.

D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson. La. Arnau Torras i Tutusaus (1966). Zagreb: Libro TIM, 1998. 23p. ISBN 953 97576 0 6. 25cm. Bildstria aventuro tra Esperantujo, en kiu la plej grava allogforto montriĝas la "etoson". 9,00 gld.

Folkloroj de Kiŝiŭada. El la japana trad. OKUMURA-Rinzo. Osaka: la tradukinto, 1998. 123p. 26cm. Ilus. 26 malnovaj popolarakontoj. 18,00 gld.

Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Gvidlibro de Unesko pri la ĉefaj instrumentoj de homaj rajtoj, pri proceduroj por ilia realigo kaj pri agado por antaŭenigi kaj protekti homajn rajtojn. 24,00 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

Internacia Kongresa Universitato. 1-7 aŭgusto 1998, Montpeliero, Francio. Red. A. Wandel. [Rotterdam:] UEA [1998]. 14+88p. 29cm. Kompleta prelegaro (Faria de Bastos, Koutny, Minnaja, v. Oostendorp, Tonkin, Tyblewski, Vergara, Wandel). 18,00 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

Interrilatoj spirito-materio. Jorge Andréa. El la portugala trad. Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V.Lorenz, 1998. 51+6p. 21cm. "Skema ideo pri la regionoj, kie okazas la interŝanĝo inter la spirita kaj la materia mondoj de difinita estulo". 6,00 gld.

Klara vortaro Esperanta-araba. Georgo Abraham (1916). Rotterdam: UEA, 1998. 308p. ISBN 92 9017 056 5. 24cm. Pionira verko, kiu forigas la mankon de ampleksa Esperanto-vortaro por arablingvanoj. 30,00 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Kongresa libro. 83-a Universala Kongreso de Esperanto. Montpeliero, 1-8 aŭgusto 1998. Red. Nikola Raŝić. Rotterdam: UEA, 1998. 160 p. 21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kulturo kaj evoluo. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21 cm. Studo de trinidad klerulo kaj diplomato kadre de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo. 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kvar mirindaj rakontoj el la Pireneoj. Adelin Moulis (1896-1996). Trad. Christian Lavarenne. [Balagué:] Hejmoj/Federacio *Esperanto Midi-Pyrénées*, 1998. 49p. 21cm. Dulingva: provençala-Esp. (en du tradukoj,

pleksiga reverko de la Esperanta romano *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen*. 45,00 gld.




Okcitana antologio. *Dulingva.* Kompilis Christian Lavarenne. [Balagué:] Hejmoj/Federacio *Esperanto Midi-Pyrénées*, 1998. 45p. 21cm. Precipe religia, ĉefe poezia; de la frua mezepoko ĝis la nuno. 12,60 gld.

Ten Esperanto poets in English translation. El Esperanto en la anglan trad. W. Auld, M. Boulton, M. Fettes k.a. Londono: [E-Asocio de Britujo], 1991. 40p. 21cm. Mimeo. 7,50 gld.

Tria testamento. La. *La eterna mondbildo* 1-2. Martinus. Kopenhago: Martinus-Instituto, 1998. 249+25p. ISBN 87 575 0126 2. 25 cm. El la dana trad. Ib Schleicher. 26 koloraj ilustraĵoj tutpaĝaj. "Logika vivklarigo", "natura daŭrigo de religioj". 72,00 gld.

Ukraina-Esperanta vortaro-minimumo. *Kun skizo de Esperanta gramatiko.* Volodimir Pacjurko, Vasil Stanoviĉ. Red. E. Kovtanjuk. Drohobiĉ: Bona Koro, 1998. 297p. 14cm. Bind. 5000 vortoj. 12,90 gld.

Usono nigre-blanke. Komp. Ionel Oneț (1956). Berkeley: Bero, 1998. 110p. 14x22cm. Ringe bind. Mapoj kaj donitaĵoj pri ĉiuj ŝtatoj de Usono. 17,40 gld.



UEA kontribuas al siaj propraj statutaj celoj hejmgigante Unesko-eldonaĵojn en Esperanto kaj donante E-vortaron al unu el la plej grandaj mondlingvoj.

proza kaj poezia). Tradiciaj tekstoj, kiujn kolektis fama langvedoka verkisto. 10,80 gld.

Lingvo-orientiga instruado / Sprach-orientierungsunterricht. *Klerigscienca kontribuo al la lingvokibernetiko interlingvistika.* Helmar G. Frank (1933) kaj Günter Lobin. Nitra/München: Akademia Libroservo, 1998. 7+280p. ISBN 80 967425 3 1. 21cm. Dulingva: germana-Esperanta. 36,00 gld.

1898-1998. Centjara asocia Esperanto-movado en Francio. Hervé Gonin (1947) kun helpo de Jean Amouroux (1937). Paris: Unuiĝo Franca por E-o, 1998. 215p. 21cm. En tri kajoroj. Detalriĉa historia prezento; same konsultverko kiel flua legaĵo. 48,00 gld.

No Butterflies in Bergen-Belsen. Trevor Steele (1940). London: Minerva Press, 1998. 453p. ISBN 1 86106 981 2. 20cm. Angla-lingva. Romano. En 1969 juna brito, estro de hejmo por eksterlandaj eks-prizonuloj en Germanio, estas murdita. 25 jarojn poste aŭstralia studento enketas pri la krimo. Ekstermovade eldonita, profunda kaj am-

Vocabolario Esperanto-Italiano, Italiano-Esperanto. Nino Vessella (1947), Renato Corsetti (1941). Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1998. 108p. ISBN 88 85872 10 7. 21cm. Ĉ. 3600 italaj kapvortoj kaj 2100 Esperantaj kapmorfemoj. Kompilita kun konsidero de ofteco-listoj. 18,90 gld.

GLUMARKOJ

Kampanjo 2000 — Esperanto. 3,00 gld. (folio 10-opa). Triona rabato ekde tri ekz.

84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlino 1999. 6,00 gld. (folio 24-opa). Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

SONKASEDOJ

Miraklo. *Tekno-etnika muziko.* Solo (Eduardo Vargas, 1959). Malaga: la aŭtoro. 14 kantoj, parte laŭ Esperantaj poemoj. 27,00 gld.

Requiem. *Elektra 2.* Solo. Malaga: la aŭtoro. 49 min. Elektronika muziko: funebra meso por orkestro kaj kantistoj, kaj kvin "alojoj". 27,00 gld.

Reagoj



Miskokeriko

En sep. (p. 163) aperis resumo de notico el la Montpeliera kongresa kuriero *Koko* pri grupo el Ruslando, kies buso devis “atendi plurajn tagojn ĉe la ĉeĥa-aŭstra limo”.

Se *Koko* rekte turnus sin al la grupo, ĝi ekscius ke la buso neniam estis (kaj ne devis esti) ĉe la limo inter Ĉeĥio kaj Aŭstrio, kaj ke ĝi strikte sekvis la planitan itineron. Sed ĉar la franca ambasado — konforme al la datoj indikitaj en la oficiala invito de UEA — donis la Ŝengenajn vizojn nur por la kongresa periodo, la ruslanda grupo pasigis plian diurnon en Altaj Tatroj (Slovakio), kie ni ĝuis la helpon de Milan Zvara. La buso kun la grupo aperis en Montpeliero nur je la solena malfermo.

Kompreneble, la kongresa kaso apenaŭ sufiĉas por establi bone funkciantan ĉiutagan informilon, kaj oni dependas de la bonvola helpo de lokanoj. Tamen ĉe difino de la kuriera skipo la elektokriterio devas esti ne nur helpemo, sed ankaŭ profesieco. Ja postkongrese pluraj movadaj gazetoj senkritike prenas el KK materialojn por reapero, kaj misinformoj de KK povas rapide disvastiĝi, kiel okazis pri la menciita kazo pri nia grupo, jam aperinta en *Esperanto* kaj *Evento*.

Halina Gorecka (Ruslando)

La berbera en la Kanarioj

J. de las Heras asertas (sep., p. 152) pri la berbera lingvo: “neniam parolita en la Kanarioj”. Probable, tiu ĉi aserto ĝermis en kampo de hispanisma

ideologio! La Kanariaj insuloj estas, geografie, nediskutebla parto de Afriko, kaj eĉ historie, ĝis la definitiva koloniado fare de la “Katolikaj Reĝoj” inter 1478 kaj 1496, neniu konsideris ilin eŭropaj. Ekde tiam la insularo estas, simple, hispana kolonio, kontraŭ kies originaj loĝantoj oni praktikis etnocidon 100%-e sukcesan. Tiuj indiĝenoj nomiĝis la *güanĉoj*, kaj ilia lingvo estis — supozeble tre frue apartiĝinta — ŝoso de la tamazirta (alinome mazira aŭ berbera) lingvo. Tion pravas komparoj inter la resto de la güanĉa lingvo kaj respondaj leksikaĵoj de la nuna tamazirta lingvo. Pri ĉi tio informas ekz. hispaniaj enciklopedioj kiel *Enciclopedia Universal Sopena* kaj lernolibroj de la tute ne “suspektinda” eldonejo Anaya.

Uwe Joachim Moritz (Germanio)

Al la uzantaro de Esperanto

Mi havas feliĉon raporti al vi, karaj alilandaj geamikoj, ke nia Federacio eknomis sin Federacio Esperanto de Barato (kaj ne Bharato) kaj nian landon Barato (same sen h).

Ĉu vi povus — kontraŭ tiu ĉi niaflanka cedo al la langokutimoj de multaj — per reciproka gesto ekklopodi prononci la sinsekvojn “konsonanto plus h” eĉ en alilande nekutimaj pozicioj, kiam temas pri barataj nomoj monde malpli ofte uzataj (personaj: *Gandhi, Nehru, Bhavé, Bhat*; lokaj: *Bhimavaram, Andhra Pradesh, Ghatkesar*; etnaj: la *marathoj*), ankaŭ ĉe Esperanta asimilo (ekz. *gandhianoj, nehuismo*)? Se vi ja plu kripligos niajn nomojn, tiam almenaŭ mi ĉesos kredi ke la E-komunumo efektive fidus al la ideo de sendiskriminaciaj, malkoloniaj personaj kontaktoj en egaleco. Pardonu pro eventuala malĝentilo en tiuj ĉi vortoj: mi estas iom laca pro la multjara diskutado kun pluraj el vi.

Mi memorigu ke temas pri la neceso distingi inter la lingvo hindia, la religio de la hinduoj kaj la lando Barato (nomata *Bharat* en ties lingvoj), strebanta al neŭtraleco rilate al siaj lingvoj kaj religioj. La nomoj por la Hinda Oceano, Hindoĉinio, la hindeŭropa lingvofamilio k.s. aludas al la hindlanda regiono, kaj ne al la nuntempa respubliko Barato. Tiaj nomoj do senĝene restu kiel ili statas, kompreneble.

Probal Daŝgupto (Barato)

Abontarifo 1999 de la Libroservo de UEA prezoj en nederlandaj guldenoj

Revuo	n-roj jare	jar- tarifo	Revuo	n-roj jare	jar- tarifo
Boletín (hispana)	5	80,00	Juna Amiko (por lernejoj)	4	24,00
Brazila Esperantisto	4	40,00	Kancerkliniko, La (ajnista)	5	44,00
Brita Esperantisto, La	6	49,50	<i>aerpoŝta aldono</i>		8,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		12,00	Kosmos (filozofia)	4	33,00
Bulgara Esperantisto	3	35,00	Language Problems and		
Dia Regno (KELI, aere)	12	25,00	Language Planning	3	92,00
Dua Jarcento, La			<i>institucioj</i>		195,00
(Internacia E-Muzeo)	4	33,00	Lanterno Azia, La		
El Popola Ĉinio (aere)	12	63,00	(korea, aere)	6	25,00
Esperantisto Slovaka	4	40,00	Literatura Foiro	6	58,00
Esperanto Aktuell (germana)	8	39,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		16,50
Esperanto, L' (itala)	9	60,00	Litova Stelo	6	24,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		6,00	Medicina Internacia Revuo		
Esperantolehti (finna)	6	30,00	(aere)	3	30,00
Esperanto sub la Suda Kruco			Monato (novajmagazino)	12	80,00
(australia-novzelandaj,			<i>aerpoŝta aldono</i>		11,00
aere)	6	50,00	Norvega Esperantisto	6	22,00
Espero Katolika (IKUE)	6	65,00	Ondo de Esperanto, La		
Espero, La (sveda)	6	44,00	(soci-kultura)	12	48,00
Fonto (literatura, aere)	12	60,00	Oomoto (religia/kultura, aere)	2	23,00
Franca Esperantisto	11	67,00	Riveroj (literatura)	4	60,00
Gazeto, La (kultura)	6	59,00	Rok-gazet' (muzika;		
<i>aerpoŝta aldono</i>		8,00	abono de 4 n-roj iam ajn)	1	38,00
Heroldo de Esperanto	16	62,00	Scienco kaj Kulturo	6	55,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		25,00	Sennaciulo /		
ICEM-Esperanto			Sennacieca Revuo	12	113,00
(Freinet-pedagogio)	4	40,00	Simpozio (filozofia)	2	16,00
Internacia Pedagogia Revuo	4	30,00	Starto (ĉeĥa)	6	18,00
Jaro, La (agendo)	1	10,00	TEJO Tutmonde	4	21,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00	Tempo (kroata)	4	18,00

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio, aldoniĝas imposto de 6%.



• Ĉeĥio: Klubo post inundo

La 75-a datreveno de la E-movado en Přerov estis festita de ĉ. 80 homoj el 4 landoj, la 24-an de okt., ĉe la E-klubo. Ludvík Chytil prelegis pri la lokaj pioniroj. La inundoj de somero 1997 neniigis la tutan bibliotekon de la klubo, kaj kelkaj anoj perdis sian domon. Tamen la klubo trovis novan ejon kaj plu apartenas al la plej aktivaj en Ĉeĥio. (*Eventoj*, S. Mandrak)

• Japanio: Ludovikito premiita

La 85-an Japanan E-kongreson (3-4 okt., Kanazawa) partoprenis ĉ. 480 homoj, pli ol en la antaŭaj du jaroj. UEA-prezidinto Lee prelegis pri la strategio de UEA. La estraro de Japana E-Instituto aljuĝis "Specialan premion pro sciencaj meritoj" al ITÔ Kanzi ("ludovikito"), kiu estas ĝia dua ricevinto, post MIYAMOTO Masao.

Laŭ peto de unu el la viktimoj de japana leĝo kiu persekutis rezistantojn dum la dua mondmilito, KURITA Kimiaki (✉serpento@mb.infoweb.ne.jp; ☎0559-72-0819) tradukis Esperanten peticion al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj, kiu alvokas ĉi tiun rekomendi al la japana registaro "formale pardonpeti pro kaj kompensi por la brutalaj agoj faritaj de ĝia milittempa tennoa (imperiestra) reĝimo" kontraŭ tiuj "kiuj oponis japanan agresmiliton kaj nigran politikadon, kaj luktis por [...] paco kaj demokratio". (*La Revuo Orienta*)

• Kroatio: Intertrakto pri 2001

Kulturministro Božo Biškupić akceptis la 21-an de okt. delegacion de Kroata E-Ligo (KEL-prezidanton Dali-bor Brozović, sekretarion Spomenka Štimec kaj junularan reprezentanton Faruk Islamović) por trakti pri la Zagreba UK en 2001, kies afiŝo estas jam presita kaj mendebla ĉe KEL (Amruševa 5, HR-10000 Zagreb, Kroatio). En la kongresa semajno (21-28 julio) okazos en Zagrebo ankaŭ prestiĝa folkloro aranĝo, dum kiu centoj da ensembloj el multaj landoj prezentiĝos sur la stratoj kaj placoj.

La delegacio ankaŭ informis la ministron, baldaŭ oficvojaĝontan al Irano, ke en Teherano pretas manuskripta perslingvigo de la kroata dramo *La amoj de George Washington* de Miro Gavran, farita de Akhtar Etemadi el la Esperanta traduko de Klaus Dahmann, kiu aperis en *Antologio de kroataj unuaktaj dramoj*. (La saman verkon angligis el Esperanto Trevor Steele.) (S. Štimec)

• Rusio: Pionire en Osetio

Rusia E-ista Unio estis reprezentita de sia prezidanto Abdurahman Junusov en internacia seminario pri homaj rajtoj en Vladikavkaz (Norda Osetio). Li informis pri Esperanto kaj interkonsentis kun Instituto Civilizacio organizi printempe E-kurson kaj helpi en la starigo de klubo. Norda Osetio ja estis ĝis nun "blanka makulo" sur la Esperanta mapo. (A. Junusov)



Komplezo de B. Selimi Mezin

• Albanio-Pollando: Komuna studumo

Jam la duan fojon albanaj gejunuloj aliĝis al la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo ĉe la sidejo de Monda Turismo en Bydgoszcz (Pollando). La 14 albanaj abiturientoj (sur la foto kun siaj polaj kunstudentoj) rajtis aliĝi kontraŭ studkotizo rabatita ĝis kvarono. (B. Selimi Mezin)

• Madagaskaro: Altaj aŭspicioj

En la malagasa lingvo prelegis Roger Rasolofo, en Esperanto Sophie Randrianarison kaj france Désiré Rabezavaha en tuttaga kultura aranĝo (Antananarivo, 11 jul.) de Malagasa E-Asocio, sub la signo de Kampanjo 2000. Reprezentanto de la ministerio pri eksterlando emfazis la gravecon de E-lernado, dum la ĝenerala sekretario de la nacia Unesko-komisiono, aŭspicie malfermanta la aranĝon, promesis sian subtenon. (D. Rabezavaha)

• Rumanio: Eklipsa programo

La nova estraro de Esperanto-Asocio de Rumanio (Bd. V. Pârvan 4, Univer-sitate, RO-1900 Timișoara) — i.a. prezidantino Aurora Bute kaj ĝen. sek. Florica Popa — lanĉis en la landa kongreso (majo, Timișoara) tri programojn, por kiuj ĝi klopodos akiri eksternajn subvenciojn. Unu el ili rilatas al

la suneklipso en 1999, kiu estos aparte bone videbla en Rumanio: ĉi-okaze EAR intencas organizi en Timișoara internacian E-renkontiĝon. (*Bazaro*)

• Usono: Ekzempla Esperanto

La E-kurso de prof. Henry R. Cooper Jr. ĉe Universitato Indiana (Bloomington) malpli celas instrui Esperanton mem ol ilustru ĝeneralajn strukturojn lingvajn per Esperantaj ekzemploj kaj propedeŭtike enkonduki al fremdlingvaj studoj. En la 75-minutaj lecionoj la 61 partoprenantoj ankaŭ diskutas pri lingvopolitikaĵoj, ekz. la oficiala statuso de la angla en Usono. (*Kvaron-jara Bulteno de AAIE*)


UK Ĝis la 25-a de oktobro al la Berlina UK (31 jul. - 7 aŭg. 1999) aliĝis 1193 personoj el 50 landoj.

Fake



• Filatelo: Stampo el Brazilo

La poŝto de la brazilaj ŝtatoj Goiás kaj Tocantins uzis specialan stampon parte E-lingvan dum la 15-a Brazila Renkontiĝo pri Administrado (16-18 sep., Goiânia). (G. Drucker)



• Muziko: Silfer sonis en Sofio

Kvin poemoj de Giorgio Silfer, muzikigitaj de Miŝo Zdravev, ricevis tondran aplaŭdon dum speciala vespero en Sofia biblioteko. Zdravev nun ser-

ĉas mecenatojn por preparata kompakta disko: p.k. 1074, BG-1000 Sofio, Bulgario; ☎+225/02/445-134. (Bulgara Esperantisto)



La Japana Budhano

• Religio: Z. estas Avalokiteŝvaro

SAMURA Ryuei, ĉefdirektoro de *La Japana Budhano* (bulteno de Japana Budhana Ligo Esperantista) opinias ke Zamenhof "estas konkretiĝo de Avalokiteŝvaro, la bodisatvo de favoro kaj kompato". Tian plej altgradan sanktecon budhisman Zamenhof atingis per sia homaranismo, per kiu li elmontris spiriton "de budhisma favoro kaj kompato". Laŭ Samura, ni povus nomi Zamenhof "Komunlingve Universale Savanta Avalokiteŝvaro".

SAT-membroj interesiĝi ne nur pri la tradiciaj laboristaj postuloj, sed ankaŭ pri la gravega problemo de medio-protektado". (*Sennaciulo*, Bulteno de REU)

En la septembra *Sennaciulo* aperis enketilo pri la agado de SAT kaj ties estraro. Ĉiu esperantisto povas partopreni: petu ekzempleron de SAT (67, ave. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio) aŭ legu ĉe <http://www.worldnet.fr/~sat-esp/Enketo.shtml/>. (R. Moerbeek)

• Tradukado: Peri el la slovaka

Aperanta en Cluj (Rumanio), la hungarlingva literatura revuo *Helikon* publikigis ses poemojn de slovakaĵaj poetoj rumaniaj, kiujn Júlia 'Sigmond hungarigis laŭ Esperantaj tradukoj de Anna Rau-Lehotská, aperintaj en la dulingva (slovaka-Esperanta) volumo *Eho de niaj krioj* (1996; 4,80 gld. ĉe la Libroservo de UEA). (*Bazaro*)

• Turismo: De Neandertalo al Vieno

Daŭre haveblas ĉe la Neandertala Muzeo (Talstr. 300, DE-40822 Mettmann, Germanio) la E-lingva faldfolio kies eldonon prizorgis la ĵus forpasinta Alfred Conzeth (vd. okt., p. 184).

E-Societo de Norda Kimrio eldonis por la ĉi-jara Brita E-Kongreso gvidlibreton pri la katedralo de Chester. Interesatoj skribu al Hilary S. Chapman, 8 Vardre View, Deganwy, Conwy, LL31 9TE Britio. (*La Migranto*)


En la Marsejla turisma oficejo estas havebla kvarlingva (franca, Esperanta, angla, hispana) flugfolio titolita "Jes, prostituado estas malobservo de la homaj rajtoj". Kontakto: Mouvement du Nid, 2 rue Loubière, FR-13006 Marseille. (*SAT-Amikaro*)

En la Viena loĝej-muzeo de Beto-veno lia testamento legeblas nun ankaŭ en Esperanta traduko. (W. Klag)

• Universitatoj: Tezo el Venezuelo

Unuafoje en Venezuelo studofina tezo rilatis al Esperanto. La 26-an de sep. ĉe la Centra Universitato de Venezuelo (Karakaso) Melissa Valor kaj Letibell Mullings, studentinoj pri ĵurnalismo, defendis sian komunan tezon, verkitan sub gvido de prof. Jorge C. Mosonyi, pri "Esperanto: alternativo ene de la procezo de kultura tutmondiĝo". (A. Turrise, Ret-Info)

En Hungario, ĉe la Universitato KLTE en Debrecen, Tibor Papp gvidas en la aŭtuna semestro du E-stud-



KIOM DA BANANOJ EBLAS EN AVIO?

Tutmondiĝo 2000 —
pri la paca konsumo de l' onto.

Invito
partopreni en la
POŝKARTA EKSPOZICIO
okaze de la
84-a Universala Kongreso de Esperanto,
Berlino, 1999



Ĉiu,
kompreneble, kaj **aparte infanoj**,
rajtas kontribui po unu artaĵon,
datitan kaj subskribitan
(kune kun slipo enhavanta bazajn informojn
pri la artaĵo kaj la artisto).
Artikoloj pri la temo estas
bonvenaj.
La kontribuadoj fariĝos posedaĵo de
la organizanto. Estos katalogo.

Limdato: La artaĵoj devas atingi la
organizanton plej malfrue la 31-an de marto 1999.

Organizanto
NULA HORO

(Internacia artgrupo kun Esperanto kiel
komuna lingvo)
Lupiro el Anvalo (Don Mail)
Schulstr. 7, DE-34292 Ahnatal, Germanio.

Libera komunikado kiel artaĵo — horizontala
demokratio — Kolektiva kreivo — Nekomerca agado
POŝKARTO — MAILART
Kombinado de poŝte ekspedebla artaĵo (du- aŭ
tri-dimensia) kun la poŝta porekspeda pri-
laborado (poŝtmarkoj, stampoj ktp) — unu el la
plej bazdemokratiaj ebloj publike formuliĝi...



Katalin Smidéliusz (meze) kaj Bertil Andréasson (maldekstre) informas kvindekda aŭskultantojn pri ILEI.

• Instruado: Amuzo kaj kleriĝo en Esperanto-Ĝardeno

Lige al sia jarkunsido, Sveda E-Instituto aranĝis sian tradician seminarion en la Esperanto-Ĝardeno de Lesjöförs la 26-an kaj 27-an de septembro. Ĉi-jare aldoniĝis ankaŭ kvartaga kurso pri la historio kaj literaturo de Esperanto. Prelegis Katalin Smidéliusz, pri “Andreo Cseh kaj lia instruado”, Vjaĉeslav Hromov, pri estoniaj temoj kaj pri la lingvoproblemo en unuiganta Eŭropo, kaj Ebbe Vilborg (“Zamenhof — ĉu kreanto aŭ imitanto?”). Odd Tangerud prezentis i.a. tradukojn el la norvega kaj islanda literaturo. Roland von Malmberg amuzis la publikon per gurma muziko, folkloraj kantoj kaj marionetoj. (M. Andréasson)

grupojn kun entute 66 partoprenantoj. En Budapeŝto, ĉe la Konstru-inĝeniera Fakultato de la Teknika Universitato Esperanto estos — laŭ propono de prof. Ottó Haszpra — libere elektebla studobjekto de februaro 1999. En la pedagogia altlernejo de Szombathely, ĉe la nova universitat-ranga katedro pri aplikata lingvistiko, interlingvistiko estas deviga kurso por la studen-

toj de la unua jaro. Krome, ĉi-semestre 30 studentoj (ĉefe ne filologoj) eklernis tie E-on en paga kurso, por facile kaj rapide trapasi postulan ekzamenon pri iu fremda lingvo. Por helpi la laboron en Szombathely, tre bonvenaj estus interlingvistikaj libroj angle kaj germane: d-rino Katalin Smidéliusz, BDTF Alk. Nyelv. Tanszék, HU-9701 Szombathely, Pf. 170, Hungario.

Per-sone



• Brozović: Papa akcepto


Okaze de sia dua vizito al Kroatio, papo Johano Paŭlo la 2-a akceptis la 3-an de okt. en Zagrebo gvidantojn de prestiĝaj kulturaj instancoj, i.a. la estron de la Leksikografia Instituto de Zagrebo kaj prezidanton de Kroata E-Ligo, prof. Dalibor Brozović. Oni povus diri ke Brozović — kiu estas ankaŭ Honora Patrono de UEA kaj gvidanto de la LKK por la UK en 2001 — kontribuis en tre aparta maniero al la Ago-Tago. (Ret-Info)

• Boutros-Ghali: Esperantosenuila

Boutros Boutros-Ghali, eksa ĝenerala sekretario de UN kaj nuna de Internacia Organizaĵo de Francilingvaj Landoj, kiu ja sendis simpati-mesaĝon al la Montpeliera UK (vd. sep., p. 149), tamen opiniis pri Esperanto en franca televida elsendo (France 2, 17 okt.): “Ĝi estas lingvo kies tempo jam pasis”. Boutros-Ghali pensas ke la angla verŝajne perdos sian potencon kiel internacia lingvo pro la apero de tradukmaŝinoj pli kaj pli perfektaj, kaj ke tial ankaŭ Esperanto “perdos sian utilecon”. (H. Masson)

• Lee: Nun landa estro

Okaze de la 30-a Korea E-Kongreso (10-11 okt., Taejon), la ĝenerala kun-sido de Korea E-Asocio elektis Lee Chong-Yeong kiel sian prezidanton por 3-jara mandato.



• Sekelj: Dek jaroj sen li

La multlande vojaĝinta E-pioniro kaj verkisto, Tibor Sekelj (1912-1988), mortis antaŭ 10 jaroj, en septembro 1988.

KVARA TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

BOGOTO, KOLOMBIO, 27 JANUARO – 3 FEBRUARO 1999

Temo: “Esperanto kaj la tria jarmilo”

Kongresejo: Winston Salem School

Adreso de LKK kaj por programkontribuoj: Apartado Aéreo 54800, Bogotá 2, Colombia, S.A. □ take99@colomsat.net.co
TTT-ejo: <http://esperanto-kolombio.org/take4/take4.htm>

Jam anoncis sian ĉeeston:

Atilio Orellana Rojas, UEA-komisito por Ameriko;

Joseph Truong, Prezidanto de TEJO;

Michela Lipari, ĝenerala sekretario de UEA;

Juan Eduardo Bachrich (Venezuela E-Asocio), Komitatano C de UEA.

Kotizo: 70 us. dolaroj ĝis la 30-a de novembro, poste 90 dolaroj.

(Ĝi ne inkluzivas loĝadon, manĝadon, transporton aŭ asekuron.)

UEA-Konto: “tkco-v”, kun indiko “Kvara Tutamerika Kongreso”.

Se vi volas trapasi **ekzamenon de ILEI**, informu nin antaŭ la mezo de decembro.

PROFESIAJ SIMULTANAJ TRADUKIST(IN)OJ (Esperanto-angla, E-franca, E-hispana aŭ E-aliaj lingvoj) estas bezonataj por ne-esperantistaj kongresoj, krome anoncist(in)oj por Esperanto-radiodissendoj. Bv. sendi biografiajn informojn al: Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA), C.P. 5050, IT-00153 Roma, Italio.

LERNEJOJ KIE ESPERANTO ESTAS INSTRUATA, interesataj pri lerneja interŝanĝo, kontaktu: Triesta E-Asocio, CP. 601, IT-34100 Trieste, Italio; nored@iol.it.

LA ASOCIO POR LA ENKONDUKO DE NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO plialtigos la dumvivan kotizon en 1999: de 500 BF al 800 BF (aŭ 20 eŭroj). Profitu de la nuna malalta kotizo. Adreso: Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio. UEA-kontokodo: anbn-h.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifen de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

43-JARA BRAZILA KOMENCANTO, inĝeniero, edzo, korespondus tutmonde. Ŝatas poezion, Interreton, naturon, biologion kaj lingvojn: Cláudio Delandre, Rua Visconde de Taunay 385/103, BR-31525-020 Belo Horizonte-MG, Brazilo; epaint@its.it.

PRI TUTMONDA ABOLICIO DE MONO verkas libron kaj bonvenigas sugestojn Timothy Gilmore: 930 Post St. #14 San Francisco CA 94109-5858 Usono; udemones@juno.com.

TRADUKU EN VIAN LINGVON mesaĝon pri mons. Kristoforo Munzihirwa, ĉefepiskopo de Bukavu (tiama Zairio), mortinta antaŭ du jaroj, kiu serĉis pacon por sia popolo. Petu la tekston de Daniel Durand (Les Nids, FR-49190 Saint Aubin-de-Luigné, Francio; dan.cdm@wanadoo.fr).

SURDA FRAŬLINO 37-JARA serĉas samsortajn gekorespondantojn, denaske surdajn aŭ ne. Nida Žilinskaite, Panevėžis 29/101, LT-2038 Vilnius, Litovio.

MIL BROKANTAĴOJ: petu katalogon ĉe Edition Iltis, Pf. 600130, DE-66067 Saarbrücken.

MEMORIGAĴOJ DE SINMORTIGINTO. Fama portugala verkisto, Camilo Castelo Branco, el la astrala mondo diktis libron pri sia vivo, kiel sinmortiginto, per la mediumo s-ino Yvonne do Amaral Pereira, kiel averton al la legontoj. Ĝin esperantigis s-ano Affonso Borges Gallego Soares. La libro havas 646 paĝojn, belan kovrilon kaj bonan paperon. Prezo: 40 USD aŭ egalvaloro, plus afranko 10%. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la eldoninto: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

44-JARA AGRONOMO serĉas korespondamikojn tutmonde: Jay Goos, 1710 South 6 Street, Fargo, North Dakota, 58103, Usono; goos@pol.org.

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO
Luksemburgio: L. Schneider.

PATRONOJ DE TEJO 1998
Hungario: Flóra Szabó-Felső. Japanio: Yoriko Itō.

SOCIETO ZAMENHOF 1998
Danio: Emil Vaarst. Finnlando: Harri Tuomola. Germanio: Oliver Walz. Japanio: Yoriko Itō. Svedio: Roland Lindblom; Sam Fritz.

DONACOJ 1998 (NLG)
ĝis la 30-a de septembro
Fondaĵo Afriko: anonime: 8000,00. Svedio: J. Hammarberg 48,86. Sumo ĉi-jara: 23 439,53.

Fondaĵo Ameriko: Francio: vendoj dum UK 35,66. Svedio: J. Hammarberg 24,43. Sumo ĉi-jara: 4706,50.
Fondaĵo Canuto: Belgio: S. De Weerd 100,00. Britio: W.H. Simcock 5,51. Francio: J. Ducrocq 10,00. Germanio: W. Ehrmantraut 34,70. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Turkio: H. Dural 8,00. Sumo ĉi-jara: 8755,12.

Junulara Fondaĵo: Aŭstrio: H. Wöginger 16,04. Sumo ĉi-jara: 2385,57.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Belgio: H. Rau 10,00. Britio: W.H. Simcock 5,52. Francio: J. Ducrocq 10,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Usono: S. Lawton 60,00. Sumo ĉi-jara: 1389,28.

Volontula Fondaĵo: Britio: W.H. Simcock 5,52. Francio: J. Ducrocq 10,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Nederlando: C.C.M. Tan 4,79. Sumo ĉi-jara: 2042,86.

Kampanjo 2000: anonime: 50,00. Korea Respubliko: Y.H. Choi 95,50. Norvegio: K. Gustavsen

75,60. Sumo ĉi-jara: 46 490,35.

Ĝenerala Kaso: Germanio: C. Darbellay 317,16. Nederlando: P.A. Buynsters 2,51. Sumo ĉi-jara: 7977,87.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

RENTO JE FIKSDATAJ DEPONOJ 3,5% EKDE LA 1-A DE DECEMBRO

Rezulte de la evoluo de la monmerkato, UEA malaltigos la renton je la ŝpardeponoj de la membroj, de la nunaj 4% al 3,5%, ekde la 1-a de decembro 1998. Tio koncernos ankaŭ la malnovajn deponojn kiuj maturiĝos post la 30-a de novembro.

Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; [+61-2-9810-4227](tel:+61-2-9810-4227); [+61-2-9555-9705](tel:+61-2-9555-9705); kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financoj): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; [+39-06-957-57-13](tel:+39-06-957-57-13); [+39-06-957-66-33](tel:+39-06-957-66-33); corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; [+39-06-39-72-61-98](tel:+39-06-39-72-61-98); [+39-06-39-72-61-69](tel:+39-06-39-72-61-69); lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; [+420-2-991-2201](tel:+420-2-991-2201); [+420-2-991-2126](tel:+420-2-991-2126); chrdle@telecom.cz.

Estrarano (agado en Afriko): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Sankt Hans gränd 34 B, SE-226 42 Lund, Svedio; [+46-70-636-93-78](tel:+46-70-636-93-78); kallekn@esperanto.nu.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legajon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KONTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1999 KONTAKTO aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.

Heidi Suonuuti. El la angla trad.

Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke.

Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3.

21 cm. Prezo: 12,00 gld.

Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al
la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas
bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas
klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino estas multjara manaĝero de Finna Centro por
Terminologio kaj funkciulo de ISO, Internacia Organizaĵo
por Normigado. La originalo estis verkita laŭ komisiio de
Nordterm, asocio de terminologiaj societoj en Nordio.



BAZOJ POR ESTONTA AGADO

ESPERANTO POST LA JARO 2000.

Aleksander Korĵenkov.

Diskutkajeroj 1.

Rotterdam: UEA, 1998.

18p. ISSN 1388-2252.

21 cm. Prezo: 4,80 gld.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jena eseo provas distingi bazojn por estonta agado de espe-
rantistoj kaj por kreo de pozitiva bildo pri Esperanto kaj
esperantistoj. La aŭtoro montras malfortojn de rutinaj
kredoj kaj faras kritikajn notojn marĝene de Kampanjo
2000 kaj la Manifesto de Prago.

Trinku ankaŭ vi el la akvoj de nia Fonto

Unu el la plej riĉaj libro-katalogoj
estas tiu de Fonto.

Pli ol 80 libroj, originalaj aŭ tradukitaj,
bone, bele kaj kompetente eldonitaj,
plus 18 jarkolektoj de la monata
beletra revuo FONTO.

Prestigaj verkoj kiel Rikolto, La Luzidoj,
Sed nur fragmento, Cent jaroj da soleco,
Antologio Latina... kaj la furorantaj verkoj
Lasu min paroli plu, Ili kaptis Elzan,
Gerda malaperis, Vere aŭ fantazie, de
Claude Piron, kaj multaj aliaj, troviĝas en
tiu katalogo, senpage liverebla de



Brazila Esperanto-Ligo

Ekskluziva distribuanto de Fonto

Caixa Postal 03625

70084-970 Brasília-DF

Brazilo

Fakso: 55 061 226 4446

Telefonnumero: 55 061 226 1248

bel@esperanto.org.br

Specialaj kondiĉoj por
libroservoj kaj
ceteraj revendistoj

Por senpage ricevi la katalogon, bonvolu sendi vian poŝtan aŭ retadreson.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.

La rolo de planado

en la homa komunikado.

Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto.

Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 92,00 gld.

Institucia abono: 195,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

ANONCU EN JARLIBRO 1999!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	125 gld.	250 gld.
Duona paĝo	230 gld.	460 gld.
Tuta paĝo	420 gld.	840 gld.
Kovrilpaĝo	840 gld.	1680 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1999.

POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA.
Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Dua eld. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998. 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21 cm.
Prezo: 6,60 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA mezuras la kapablon uzi Esperanton en praktiko. Centoj da esperantistoj jam ekzamenigis kun sukceso je elementa aŭ meza nivelo. Tiu ĉi gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari sin por ekzameno. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj. Specimenaj testoj de la du niveloj konigas la praktikan funkciadon de la ekzamenoj. La libreto taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj.



TUTMONDECA RIGARDO



Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio.
Kiel efikas kulturo sur teknologiaj evoluoj? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologiajn ŝanĝojn? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

"Helpas akiri pli tutmondecan rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo."
(Ulrich Lins)

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

Internacia Akupunktura Kurso pri Korea Akupunkturo, *Sa-Am*



Akupunkturo estas jam mondvaste konata kuracarto. Neniu do en la nuna mondo plu demandus ĉu akupunkturo vere funkcias. Sed se temas pri akupunkturo, homoj ankoraŭ pensas, ke ĉina akupunkturo estas ĉio.

Internacia Naturkuraca Asocio okazigas specialan kurson pri korea unika akupunkturo, *Sa-Am*, por mondaj medicinistoj kaj naturkuracistoj. En la kurso oni lernos, kiom malsamas inter ĉina kaj korea akupunkturoj kaj laŭteorie kaj laŭmetode, miros je ĝia mirakla efiko, kaj fine konstatos, kial uzantoj de *Sa-Am* akupunkturo konsideras ĉinan akupunkturiston kiel infanecan.

Sa-Am akupunkturo, inventita de korea bonzo antaŭ 450 jaroj, baziĝas ne sur klasika akupunkta teorio sed sur la 5 elementaj teorioj. Tial nature malsamas la korea kaj ĉina akupunkturoj je eĉ nadlo-aspekto, pik-maniero, selekt-principo de akupunktoj, kaj fine kurac-efiko mem. Ankoraŭ *Sa-Am* akupunkturo ne estas diskonata en la mondo, kaj fakte eĉ en Koreio malmultaj altnivelaj akupunkturistoj uzas ĝin. Tio estas kial vi devas lerni korean akupunkturiston, eĉ se vi estas sperta kaj profesia akupunkturisto. Se vi estas naturkuracisto aŭ medicinisto, ekposedu novan kaj potencon armilon, per kiu vi povos plej efike servi viajn malsanulojn. Se vi volas renaskiĝi kiel alternativa medicinisto, ne perdu tiun ĉi raran ŝancon.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

- La kurso intensive daŭras dum duonmonato.
- Por efika instruo, oni limigas al maksimume 12 homoj en unuopa klaso.
- Oni instruas vin por ke vi tuj praktiku ĝin post kurso kaj hejmvreveno.
- Lernantoj lernos ne nur teorie sed kun rekta kontakto kun malsanuloj.
- Lernantoj loĝos en gastĉambroj eŭropstile ekipitaj.
- Semajnfine okazas urba turismo kaj vizito al grandaj hospitaloj.

PS: 1. La lecionoj okazas en Esperanto kun rekta naci-lingva interpreto, do estas konsilinde, ke unu klaso estu laŭeble samnaciajanoj.

2. Vi povos mem varbi vialandanojn kaj fariĝi vialanda peranto por neesperantistoj. Perantoj estas alikondiĉe traktataj.

3. Ĝis tiu ĉi jarfino ni varbos, kaj poste informos individue la partoprenantojn pri la detaloj, ekz. dato, instruplano, kosto, kondiĉoj ktp.

Kontaktu kun:

Puramo CHONG, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kwangmyong-shi, Kyonggi-do, Koreio; ☎+82 2 682 3456, ✉+82 2 616 1571, Puramo@chollian.net; aŭ Harald SCHICKE, Puttjerberg 17, DE-27383 Hetzwege, Germanio; ☎+49 4263 94087, ✉+49 4263 94088.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO